Por memmastruma socialismo :

# POLITIKA NEPERFORTO

Teksto pri politika orientado de la Movado por Alternativo Neperforta (M.A.N.)

Esperantigis la Pacista Frakcio de S.A.T.

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
129B * 1979 * 5 FF

BERGEON J-LUKO

BERGEON j-L

esperanto

nun

Por memmastruma socialismo :

# POLITIKA NEPERFORTO

Teksto pri politika orientado de la Movado por Alternativo Neperforta (M.A.N.)

Esperantigis la Pacista Frakcio de S.A.T.

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
129B * 1979 * 5 FF

ORIGINALA TITOLO :
Pour le socialisme autogestionnaire : une non-violence politique. Alternatives non-violentes, nº 15-16, aprilo 1976.

En la sama broŝurserio :

* Levreaud : Atomcentraloj (debato)
* HD.Thoreau : Civila Malobeemo
* Jack London : La forto de la Fortaj
* Anton Pannekoek : Historia materiismo
* La Boétie : Memvola Servuto
* Ĉu armeo aŭ civila neperforta defendo ?
* T.Ebert : Ĉu neperforta revolucio aŭ revolucia liberiga milito ?
* Leĝpropono por unuflanka malarmiĝo de Francio
* k.a.

# ENKONDUKO

*********

Ĝis la ĵus pasintaj jaroj, la neperforto estis miskonata. Hodiaŭ ĝi fariĝis diskutebla, t.e. diskutinda. Ĝi ektrovas sian lokon en la komparado de la doktrinoj kaj ideologioj. Tamen multaj miskomprenoj igas, ke ofte ĝi prezentiĝas pli-malpli karikature : grava laboro por klarigado estas do farenda. La novaĵo, en la nuna cirkonstancaro,•estas, ke tiu necesa laboro fariĝis ebla. Fakte, ĉiam pli multaj estas tiuj, kiuj volas serioze pripensadi la neperforton, kaj petas de la "neperfortuloj", kion ekzakte ili kapablas proponi.

La aprobantoj de neperforto longtempe agadis dise, sen esti vere organizitaj. Cetere, oni ne miru pri tio, ĉar temas pri movado ankoraŭ relative nova en Francio : ne heredaĵo, kiu ebligus havi tuj en siaj manoj la agadrimedojn, kiujn ni bezonas en la nuntempa situacio. Hodiaŭ ŝajnas veninta la tempo por entrepreni la nepre necesan taskon de organizado, kiu devas ebligi al la neperforta agado fariĝi kredebla kaj efika en la debatoj kaj luktadoj, kies temoj estas decidofaraj pri la estonteco mem de la homaro.

Por komenci tiun klarigan laboron, ni agnosku, ke la neperfortuloj restis longtempe kaptitaj en kategorioj moralaj, filozofiaj aŭ religiaj, tra kiuj ili plej ofte esprimis sin. Sed klariĝas, ke tiaj formuladoj estas tute senefikaj, kiam oni devas fronti konkretajn situaciojn de maljusteco kaj subpremado. Oni ofte diris, ke la neperforta agado povas havi valoron nur "profetan", kaj, ke ĝi malkapablas agadi rekte politike. Kvankam fakte tia kritiko baziĝas sur profunda miskompreno de la metodoj de neperforta agado, la aprobantoj mem de neperforto ofte faciligis ĝin esprimante sin mem, kvazaŭ ili ne konus la postulojn de la politiko. Tro ofte, fakte, la "neperfortuloj" restis fermitaj en moralisma vidpunkto, predikante spiritan "konvertadon" de la individuoj, sen ekatenti pri la neceso iniciati politikan revolucion, imagante, ke la revolucio povas esti nur la tuto de la ŝanĝoj okazintaj

en la vivoj de la individuoj. Tia konceptado de la neperforto kondukas al kondamnado de la Historio per la preteksto, ke ĝi estas perforta, kaj meti sin mem "super la miksbataladon", kiam temas male pri ĉeestado meze mem de la historia okazaro kaj tie montri la efikon de la metodoj de neperforta agado. Ni forĵetas do ĉian moralisman aliron al la neperforto, kiu ignoras, ke la homo estas ankaŭ socia determinito, kaj ke, por transformi sin, se li devas mem agi, li povas atingi sian celon, nur kunagante kun la aliaj por transformi la socion. La persona amplekso certe ne estas preteratentenda, sed ĝi devas restadi rilata al la kolektiva amplekso. Ĉiuj kune ni liberiĝos el la ĉenoj, kiuj katenas nin.

La laborista klaso portas en si la memoron pri siaj vundoj kaj siaj mortintoj; tial ĝi ne pretas akcepti la moralemajn parolojn de tiuj, kiuj, veninte plej ofte el la burĝaro, predikas neperforton bazitan sur la amo al la malamiko, kio alprenas tiam la precizan signifon de interklasa kunlaborado. Nepre necesas, ke la neperforto aperinta el spirita intuicio estu frontinta la politikan realon, la necesojn de la luktado. Por reuzi frazon de MARKS, aplikitan al alia temaro, necesas "remalkovri la racian kernon en la metafizika ŝelo". Moralaj aŭ filozofiaj asertoj alprenas sian tutan signifon nur, se oni videbligas iliajn politikajn implicojn.

Krome, necesas konsenti, ke la formuladoj, per kiuj estis asertitaj la postuloj de la neperforto, insistis antaŭ ĉio pri la graveco de la rimedoj, sen ke, antaŭe, la celoj estis klare difinitaj kaj precizigitaj. Nu, diri ke "la celo estas en la rimedoj kiel la arbo en la semo", tio estas montri la valoron de la semo, sed iufoje tio estas forgesi, ke la semo estas interesa nur rilate al la arbo, kiun ni volas planti. Kiam ili estas ordonataj diri, por kiaj celoj ili batalas, la "neperfortuloj" ne povas kontentiĝi respondante, ke ili batalas por justeco, paco aŭ libereco : paroli pri justeco, paco aŭ libereco kiel ecoj estas ankoraŭ referenci al moralaj kategorioj pli ol al politikaj. Nu, ĝuste temas scii, kiujn celojn ni donas al ni, por ke la justeco, paco kaj libereco trovu konkretan esprimon.

Ĝis nun, la neperfortaj agadoj havis ĉefe punktecajn celojn, sen viciĝi klare en strategio celanta la transformadon de la socio kaj la organizadon de nova socio. Plej ofte temis pri protestado kontraŭ iu maljustaĵo, kiun oni emis

disigi de ĝia politika kunteksto. Nu, se ĉiuj, kiuj referencas al neperforto, facile akordiĝas por kondamni la atombombon aŭ la armilvendadon, la unueco ne plu estas realigita, kiam temas precizigi en kia analizo de la nuntempo kaj rilate al kia projekto por la estonteco situas tiuj punktecaj protestoj. Ekde tia situacio, aperis neeble pretendi kunigi ĉiujn, kiuj referencas al neperforto en saman movadon, kiu povu doni al si klarajn kaj kunteniĝantajn politikajn perspektivojn. Necesis konstati tiujn malsamojn, akcepti tiun pluralecon kiel fakton, kaj kalkuli kun ĝi.

Tamen, eĉ en tiu plureco, kuniĝis tiuj, kiuj samopinias kiel la analizo kaj la esplorado de la socialista memmastruma movado : kun ĝi ni denuncas la malkapablon de la kapitalismo kaj ŝtatsocialismo organizi la socion, samtempe laŭ la postuloj de justeco kaj laŭ tiuj de libereco. Ni decidis kuniĝi kaj krei la Movadon por Alternativo Neperforta (MAN). Ne plu sufiĉas al ni aserti resume, ke nia neperforta elekto atingas la intuiciojn de la memmastruma socialismo. Ni sentas la neceson klarigi tiun konvinkon, kaj precizigi, kion nia specialeco povas alporti al la esplorado kaj ekmovigado de memmastruma socialismo. Tial ni redaktis tiun ĉi tekston. Vidiĝos, ke ĝi estas nek kompleta nek finofara : ĝi ne esprimas ĉion, kion ni havus por diri, ĉar tie nur la politika aspekto de la neperforto estas ektraktita. Sed tia, kia ĝi estas, ĝi povas utili por prezenti niajn sintenojn kaj komencigi debaton, kiu , laŭ ni, neniam okazis serioze kaj klare.

# ĈAPITRO I

*********

## MALJUSTA KAJ PERFORTA SOCIO

Noto de la tradukintino : La franclingva originalo de ĉi tiu broŝuro estas 125-paĝa dokumento. Ne eblis esperantigi kaj eldoni la tuton. Tial, ĉar la analizo, kiun faras MAN pri la nuntempa socio, ne malsimilas aliajn analizojn faritajn de aliaj grupoj, kiuj batalas por memmastruma socialismo, mi citas nur la titolojn de la diversaj paragrafoj de la unua ĉapitro.

1. la kapitalista sistemo de produktado

   La sociaj rilatoj de produktado kaj interŝanĝo.
   La socia divido de la laboro.

2. la ekonomia povo

   Hierarkio kaj burokratio. La kondiĉoj de la laboro.
   La agrokulturo. Metio kaj etkomerco. La konsumado.

3. la ideologia povo

   Ideologia rolo de la institucioj. La hierarkia organizado.

4. la politika povo

   La nuna aparato de la ŝtato. Polico kaj justico. Armeo.

5. la klasbatalo

   La reganta klaso. La laborista klaso. La etburĝaro.
   La kamparanoj. Tendenceca leĝo. Klasbatalo kaj aliaj bataloj.

6. la imperiismo

   La usona imperiismo. La sovetia imperiismo.
   La "paca kunekzistado".

7. la kontraŭdiroj de la kapitalismo

   La malgrandiĝemo de la profitprocento.

8. la armeizado. Produktado kaj komerco de la armiloj.
   La armeizado de la socio. Monda armeizado : la vetarmado.

9. la franca socio
   Majo 68. La fortoj hodiaŭ. La nuna krizo.

Tamen, pro peto de MAN, jen traduko de paragrafo pri fenomeno ĉiam pli minacanta, sed tro ofte malatentata de la memmastrumaj batalantoj :

La armeizado de la socio

En Francio, oni povas difini ĝin tiel : "la procezo, kiu celas eksplodigi la barojn tradicie starigitajn inter la militista tereno kaj la civila tereno, inter la militotempo kaj la pactempo"(*). Temas do ne pri ĉieestado de la armeo sur la grundo, sed pri la plivastigado de la kontrolo de la tuto de la landaj aktivadoj far la armeo. "La nacia defendo ne estas aparta fako, ĝi estas la tuto de la aktivadoj de Francio laŭ ia perspektivo pri ĝia savado kaj ĝia postvivado", klarigis Pierre MESSMER en 1973 (**).

Tia, kia ĝi estas, tiu frazo esprimas konstaton, kiun oni ne povas multe kontesti : je la tempo de termonukleaj fortoj kaj multnaciaj firmaoj, kio vere koncernas la defendon, tio ne plu estas la limoj de ŝtato, nek la sendifekteco de ĝia "teritorio". Sed el tiu konstato, centralizanta ŝtatpovo povas tiri nur unu konkludon : la tuto de la landaj aktivadoj, jen kio devas esti armeizita, t.e. metita sub la kontrolon de specialistoj de la defendo, kaj fine, de la forta ŝtato, centralizita kaj povanta interveni ĉien. El la sama konstato popola povo tirus la malan konkludon : la tuto de la defend-aktivadoj, tradicie konfiditaj al specialistoj, jen kio devas esti civiligita, t.e. farataj de la popolo mem, per ĝiaj propraj rimedoj. Armeizi la socion aŭ civiligadi la defendon : tia estas la alternativo, kaj ne estas mirinde, ke ĉiuj reĝimoj kun forta ŝtato (kapitalistaj aŭ "socialistaj") pelas sin al la unua termo de tiu alternativo, tiom veras, ke la akceptado de la dua postulus duoblan revolucion : la prenadon de la povo far la popolo, laŭ perspektivo memmastruma, malcentralizita; kaj la eltrovadon de defendmetodoj reale popolaj, kun la forlaso de la rimedoj, organizoj kaj ideologioj propraj al la perarmila defendo. Tiu elekto estas malvolvita en la ĉapitro 4a.

---

(*)BRACHET, TACHON, PONS, La France militarisée. Cerf,1974, p.26.
(**)Revue de la Défense Nationale, novembro 73, p.161.

"La tuto de la aktivadoj" : jen formulo, kiu antaŭvidigas, ke oni tuj trovos la armeizadon ĉie, kaj iufoje en la plej neantaŭviditaj terenoj...

Venas unue la scienca esplorado : la tielnomataj "evoluintaj" landoj elspezas proksimume la duonon el sia poresplorada buĝeto laŭ perspektivo rekte militista. Ekde la dua mondmilito, liga estas la kunlaborado de sciencistoj kaj militistoj : de la atombombo ĝis la "elektrona milito" en Vjetnamio, neniu el la gravaj novaĵoj en la batalteknikoj kaj la strategioj estus ebla sen grava investado de "pensĉeloj", de financoj, de ekipaĵo en la sciencan-militistan esploradon. La sciencistoj iufoje provas pravigi tiun "kunlaboradon", insistante pri la civilaj konsekvencoj de la militista esplorado; veras, ke en kelkaj plej aktivaj sektoroj (elektroniko, informadiko, atomfiziko, notinde), la militista esplorado kaj la civila esplorado estas tiel ligitaj, ke estas iom arte provi distingi ilin. Estas tiam des pli interese, konstati ke temas ĝuste pri la sektoroj, kie la civilaj aplikadoj mem havas pli ol diskutinda intereson !

Tielnomataj "pacaj" atomcentraloj, pli kaj pli striktaj policaj kaj administraciaj kontroloj dank'al la komputoroj... la disvolvado de iaj subpremmetodoj okazas plej ofte kiel rekta daŭrigo de la armeizado. Krom tiuj plej aktivaj sektoroj, la militista esplorado estas tiel specialigita, ke ĝia civila aplikado fariĝas neebla : oni opinias, ke 70 ĝis 90 % el la militistaj esploradoj ne havas intereson por la "civilo" En Francio, ĉiu nova patento, kiu povus eventuale interesi la militistojn, devas, se ili deziras tion, resti sekreta, eĉ se ĝia civila uzado estus interesa.

La militista esplorado ne limiĝas en la tereno de la sciencoj, kiujn oni nomas ekzaktaj : ankaŭ la prihomaj sciencoj estas trafitaj, kaj ĉiam pli kaj pli; la kondutado de la homoj kaj de la socioj en la diversaj kazoj de "minaco" estas temo de grava studado kaj esplorado. Ŝajnas, ekzemple, ke pri pedagogio (teknikoj por formado, uzado de testoj, ktp...) la plej bonaj specialistoj hodiaŭ estas la militistoj.

Ĉe la tempo de la interkontinentaj raketoj, de la atomaj submarŝipoj, de la surorbita bombo, ne estas mirige, ke la armeizado estas tre ligita kun la spackonkerado (la vetkurado al la luno havis evidentajn militistajn celojn), la esplorado de la submaro, la meteorologio... Pli proksime de ni, ĝi tra-

fas ankaŭ ĉion koncernantan la komunikojn kaj telekomunikojn : okaze de "krizo", la kontrolo super tiuj sektoroj estus vivdecida por la armeo, tial ĝi "trejnas" sin pri tio, iufoje ĝuante la strikojn de iuj publikaj servoj : tiel, la striko de la "ĉielkomutistoj" ebligis, en marto 73, al la armeaj teknikistoj famiĝi per la tre konata akcidento de la hispana aviadilo "Coronado" (68 viktimoj), kaj, en novembro 74, la striko de la poŝtistoj ebligis al la armeaj oficoj de laŭspecigo kaj poŝto ektrejni sin.

La armeizado manifestiĝas ankaŭ per la geografia plivastigado de la militista tereno. Kun 270 000 hektaroj, la armeo fariĝas en Francio, de post la fino de la mondmilito, la plej grava grundposedanto. La afero de Larzako, pro la nacia amplekso, kiun la kamparanoj kapablis doni al ĝi, atentigis pri tiu fenomeno, kiu kutime okazas senbrue. Sed per dekoj oni devas nombri la plivastigadojn kaj kreadojn de armeaj terenoj dum la lastaj jaroj.

Necesas fine pluinsisti pri armeizado ĝenerale nekonata, sed kiu tamen kondiĉas la efikon mem de la tuta procezo : tiu, kiun oni povas nomi la administracia kaj justica armeizado. Ne sufiĉas, fakte, armeizi la tuton de la sektoroj de la landa aktivado, se la laboristoj rifuzas funkciigi ilin... Same kiel laŭ la klasika vidpunkto de la "defendo de la landlimoj" estis "ĝenerala mobilizado", tiel laŭ la vidpunkto de la ĝenerala armeizado, estas mobilizado ĉe la laborejoj. Tion signifas en Francio la leĝo de la 7a de januaro 59, vera ilo por la armeizado de la popolo.

Kiam nuligita la malsamo inter militotempo kaj pactempo, tiam la defendaparato devas esti konstanta. Pretekste de "minacoj", kiujn povas taksi nur la registaro, pluraj sektoroj de la landa aktivado povas, per nura registara dekreto, fali sub armean direktadon; tiam la striko fariĝas "dizerto" juĝota de armeaj tribunaloj, la rifuzo obei ordonon de la firmaa hierarkio estas juĝata kiel "obe-rifuzo" ĉe la armea justico, ktp... Neniam estis precizigitaj la minacoj, kiuj povas decidigi la ekaplikon de tiu leĝo de 59; ili povas esti internacia krizo, minaco pri atoma milito, grava natura katastrofo, sed ankaŭ (kial ne ?) grava popola movado, eventoj similaj al tiuj

de majo 68... La efiko de la antaŭviditaj decidoj postulas la kreadon de nacia sliparo "difinanta la ekzaktan situacion de ĉiu laboristo, por ke, en la kazoj antaŭviditaj de la leĝo, li povu esti 'nemovebligata' ĉe sia ofico, ekde la simpla 'rekvizicio' ĝis la 'averto' kaj la 'mobilizado' " . Aplikade de tiu leĝo, de 1964 la laboristoj de la plimulto el la administracioj kaj fabrikoj estas regule petataj plenigi demandaron pri sia "defenddestino". Neniu sindikato, neniu politika grupo ĝis nun protestis kontraŭ tiu "formalaĵo", nek donis al siaj membroj la instrukcion rifuzi ĝin...

Veras, ke, ĝenerale, la armeizado estas vere analizata kaj kontestata de neniu; ke ĝin ne kontestas la reganta klaso ne mirigas, ĉar tio servas tre efike ĝian ekonomian kaj politikan povon. Sed, ĝis nun, nek la maldekstro nek la radikala revolucia maldekstro faris ĝin luktotereno; ili plu konsideras nur la problemon de la Armeo (iufoje eĉ nur tiun de la soldatservo) : ili interesiĝas pri ĝi kiel pri institucio forigenda kaj anstataŭigenda per la "popolo kun armiloj"... Sed, ĉe la unua kiel ĉe la alia kazoj ili evitas la ĉefan problemon : ĉu por la demokratio, por la socialismo, la danĝero venas de la armeo kiel aro da homoj, kiuj povus "pezi" kaj interveni en la politikan vivon ? Aŭ ĉu ĝi venas pli el la disbranĉiĝo de la militaparato (ni eĉ ne diras, de la armeo) en la tuton de la socio, kun ĉiaj konsekvencoj je kunkulpado, nekonscia aŭ rezignacia, de la tuta laboristaro kaj civitanaro ?

* * *

# ĈAPITRO 2

*********

## NIA PROJEKTO POR SOCIO :

## LA MEMMASTRUMA SOCIALISMO

### 1. Por alia socio

La nura denuncado de la kapitalismo ne estas tre kredebla, se ĝin ne akompanas la propono de ebla alternativo. Kiam la privilegiuloj kaj profitantoj de la staranta sistemo priinsistas, ke la revoluciuloj volas detrui sen ion proponi, ilia argumento ne estas akceptebla, ĉar ĝi utilas nur por maski ilian volon pludaŭrigi la kapitalisman organizadon. Sed oni ne blindiĝu pri la tre reala efiko de tiaj argumentoj ĉe la popolaj amasoj, kiuj tamen havas neniun objektivan intereson en la konservado de la sistemo... Por daŭreble mobiliziĝi en politika lukto, por preterpasi la nuran defendon tagon post tago kontraŭ la subpremado en la laboro aŭ en la ĉiutaga vivo, por eventuale **konsenti** kelkajn riskojn, ne sufiĉas "konscii", ke la kapitalismo estas malbona, necesas ankaŭ havi ideon, eĉ se neprecizan, pri la tipo de socio, kiun eblas starigi. La propono pri socialisma elekto samtempe ebla kaj loga estas unu nepre necesa armilo en la hodiaŭa lukto.

La socio, kiun ni volas, estas neakordigebla kun la kapitalisma reĝimo; ĝi ankaŭ ne eblas en socialisma sistemo ŝtata kaj burokrate centralizita. Aperinte en Rusio, en ekonomie malmulte evoluinta lando, tiu ŝtatsocialismo ebligis, dank'al la planado, sufiĉe rapidan disvolviĝon de la produktado, almenaŭ dum la unua periodo. Sed, sen pretendi reskribi la Historion, ni ne povas konsenti al speco de socia organizaĵo, kie la produktrimedoj estas en la manoj, ne de la laboristoj, sed de la Ŝtato, kie la planado estas ordonema, la mastrumado tute centralizita...
Tio cetere ne malhelpas nin por agnoski, ke iuj malegalaĵoj estas tie malpli okulfrapaj ol en niaj okcidentaj socioj, kvankam ne tute malaperintaj.

Sed, precipe, tiu "socialismo" forigis la privatan posedon de la produktrimedoj sen vere aliigi la produktrilatojn : ili restas rilatoj de povo. La rilatojn inter laboristoj kaj kapitalistoj anstataŭis, sen notinda ŝanĝo,

rilatoj inter laboristoj kaj ŝtato. La "povo de la laboristoj" estis konfiskita far la "Partio de la laboristoj", poste far la estroj de tiu partio mem. Nome de la laborista klaso, la partio kaj ĝia aparato identiĝas kun la ŝtato, kio tute falsas la ideologian kaj politikan volon de la revolucia partio : ĝi fariĝas regilo, tute obeema en la manoj de la ŝtato. Ŝtato kaj partio, konfuzitaj, transformas la "diktaturon de la proletaro" al diktaturo sur la proletaro. Ekde tio la vojo estas malfermita al totalismo kaj arbitro. Krom nenegeblaj sociaj realigoj, oni devas konstati la antaŭrajton donitan al la ekonomia kreskado kontraŭ la disvolviĝo de la persono, la mankon de libereco (pri esprimado, pri gazetoj, pri la sindikata rajto, pri organizado...), la konservadon de koncentreja universo (Gulag, deportadoj, arbitra enŝlosado en psikiatriejoj, ktp), la militismon, la imperiismon (Hungario, Ĉeĥoslovakio...). Tamen oni devas agnoski, ke la premoj de la kapitalisma ĉirkaŭo klarigas parte tiun historian evoluadon, sen pravigi ĝin.

La lukto kontraŭ la kapitalismo kaj la rifuzo identigi la socialismon kun ŝtata modelo devas konkretiĝi en politika projekto kohera kaj ebla. Tiu projekto estas nek revo de utopiuloj, nek jam farita sistemo : kvankam ĝiaj radikoj estas malnovaj kaj profundaj, ĝi ellaboriĝas iom post iom de antaŭ kelkaj jaroj, el novaj formoj de lukto, el novaj postuloj; ĝi iras sian vojon en partioj, sindikatoj, estas temo de teoriaj esploroj. Oni eĉ donas al ĝi nomon, kies precizeco ne devas forgesigi, ke temas ankoraŭ pri esploro : la memmastruma socialismo. Tiun projekton ni alprenas nia, ĉar ĝi estas la nura, kiu lasas esperi la reakordiĝon de socialismo kaj de libereco, kaj ebligas, post pli longa tempo, malaperon de la rilatoj de perforto (struktura aŭ korpa) en la socia organizo

## La nunaj luktoj

La socialisma, memmastruma projekto enradikiĝas, ekde majo 68, en iomaj konstateblaj faktoj, kiuj ebligas iom post iom skizi ĝiajn grandajn liniojn :

En la entreprenoj, dum pludaŭras la salajraj postuloj, aperas relative novaj celoj rilate al la organizado de la laboro (rifuzo al kadencoj, al la diserigado de la taskoj, kaj pli ĝenerale, al la labordivido), rilate al la ebleco kontroli kolektive la mastrajn decidojn pri kvalifiko, produktokvanto, produktiveco, laŭpostenaj notoj, labordaŭro, profesia formado pri la rajto al garantio de la oficoj (kontraŭ la maldungoj

kaj la malstarigo de entreprenoj) kaj eĉ pri la celoj de la produktado.

Tra tiuj luktoceloj la laboristoj esprimas, ke la entrepreno estas ne nur la loko, kie ili vendas sian laborforton, sed ankaŭ la loko de povo, kiun ili devas kontroli, ĝis ili praktikos ĝin. Tiuj luktoj, kiuj sin turnas kontraŭ la kapitalismajn produktrilatojn kaj leĝaron, esprimas rifuzon al ĉia "socialismigo", kiu ne ebligus al la laboristoj praktiki povon en sia entrepreno. Ofte organizite sen la antaŭa konsento de la sindikataj kaj politikaj staboj, tiuj luktoj montras, ke la laboristoj povas ŝarĝi sin per siaj propraj responsoj kaj organizi sin por mem transformi siajn viv- kaj laborkondiĉojn. Tiel iom post iom senmitiĝas la mastra hierarkio, kies "kompetenteco" iufoje aperas ja tro-estimita.

Al tiu hierarkia socio la luktantaj laboristoj kontraŭmetas alian specon de organizado, en kiu la decidoj estas farataj plej ofte en ĝenerala asembleo kaj la responso pri ili kolektive akceptita, kun egaleco de rajtoj kaj povoj. Tiel oni spertis la dispartigon de la produkto de "malofi-ciala" laboro en egalajn salajrojn; oni spertis la postulon pri egala alirpovo al ĉiuj informfontoj; oni observis, en la strikoj kun okupado, la zorgon dispartigi la materialajn taskojn egale inter ĉiuj.

Sed, preter la novaj postultemoj kaj la novaj organiz-formoj, estas la libereco elpensi novajn agadformojn, kiu konsistigas la plej gravan alporton de la nunaj luktoj. La sinturno notinde al kolektivaj praktikadoj de malobeado al la leĝo (tio, kion oni nomas "civila malobeado") estas ne nur tre grava alporto al la "armilaro" de la luktoj; ĝi estas ankaŭ la eksigno de liberiĝo el la "leĝisma" ideologio, sen kiu nenia arbitra povo povas pluekzisti. Laŭ tiu vid-punkto, la nura fakto, ke oni kutimiĝas al tiuj luktoformoj, preparas socion, kie la "praveco" estos distingita de la "leĝeco".

Ekster la entreprenoj, oni konstatas, ke pli kaj pli multaj luktoj koncernas la tuton de la socia vivo : lernejo, sano, konsumado, transportoj, armeo, migrantoj, malliber-ejoj, prostituado, ekologio, starigado de atomcentraloj, aŭtonomio de iuj "regionoj", depostuloj por kultura identeco de la naciaj malplimultoj, rajto de la hominoj, ktp... Ĉiuj

tiuj luktoj ne estas aŭtomate portantoj de socialisma projekto unuflanke, ĉar tiuj, kiuj travivas ilin ne ĉiam havas la neces ajn analizojn por fari la ligon inter sia tuja problemo kaj la sumaj strukturoj de la socio; aliflanke, ĉar la socialista pri pensado ofte manifestas ian malfidon pri temoj kaj luktoformoj ne antaŭviditaj de la "teorio". Tamen restas vere, ke, eĉ sen eksplicita formulado, tiuj luktoj kontribuas skizi malcentrali zitan memmastruman socialismon, ĉar ili malseptas la diversajn sektorojn de la socia vivo, montras kiel ĉio interdependas, ĉio estas "politika", ĉio estas loko de "povoj" prenendaj kaj praktikendaj. La ekzemplo de la lukto de la Larzakaj kamparanoj estas, laŭ tiu vidpunkto, speciale signifa : oni vidis ilin evolui de nura rifuzo al la eksproprietigo de siaj terenoj ĝis kontestado de la armeo kaj de ĝiaj roloj, ĝis konsciiĝo pri siaj solidaroj kun la laborista klaso, kun la subpremataj malplimultoj, kun la kamparanoj de la Tria Mondo; la defendo de la terenoj fariĝis defendo de la tero kiel "laborilo". Multaj el ili scias nun, ke, eĉ se ilia lukto venkos, neniu fu da problemo, kies manifestado ĝi estas (armeizado, subpremado de malplimultoj, superrajtaj eksproprietigoj, koncepto pri la "defendo", ktp) estos solvita sen la starigado de vera socialismo.

En ĉiuj tiuj luktoj eksperimentiĝas novaj formoj de agado kaj organizado. Oni povas diri, ke, se ili ne celas memmastrumadon, tamen ili estas memmastrumataj, ke la ŝarĝo pri ili demokrate estas prenita far la koncernatoj mem; ili videbligas la deziron kaj la kapablon de la laboristoj kaj civitanoj decidi en ĉiuj sferoj, kiuj rilatas ilian vivon; ili esprimas emon al alia kultura, ekonomia kaj politika projekto.

Neniu imagas serioze, ke tiuj luktoj sufiĉos por starigi memmastrumadon : la preno de la ŝtatpovo restas necesa kondiĉo. Sed precipas, ke la memmastruma dinamismo, kiu manifestiĝas en tiuj eksperimentoj pri la luktoj, povu esprimiĝi en la mastrumado mem de la starigenda socio. La memmastrumado estas samtempe revolucia praktiko kaj tipo de starigenda socio: ambaŭ estas ligitaj. Se oni ne estas jam memmastruma en la orga nizoj, en la agadmetodoj, en la celoj kaj formoj de la lukto, en la elekto de ĝenerala strategio, estas malmulte da perspek tivoj, por ke memmastruma projekto realiĝu poste. Pri tio oni devus insisti, eĉ se, por la klareco de nia teksto, ni estas devigataj disigi ambaŭ aspektojn, prokrastante ĝis la venonta ĉapitro ĉion, kio koncernas la memmastrumadon kiel luktometo-

don kaj nin limigante ĉi tie pri la memmastrumado kiel organizformo de la socio.

## De la utopio ĝis la projekto

Ni neniel intencas ellabori striktegan skemon, kiu antaŭvidus ĝis en la detaloj ĉiujn instituciajn mekanismojn, per kiuj la socio kaj ĝiaj diversaj mekanismeroj devus esti mastrumataj. Eĉ se tion ni kapablus, tio signifus antaŭdecidi arbitre tion, kio finfine devas esti la rezulto de kolektiva ellaborado de la laboristoj kaj civitanoj. Per difino, en tiu tereno, ni povus partopreni nur en esplorado. Sed la risko estus tre reala, difini la memmastrumadon nur per konceptoj de utopio, kies realigado estus prokrastata ĝis reva estonteco : nenio estas pli malmobiliziga por la hodiaŭaj luktoj.

Certe, la vorto "utopio" ne estas nepre mallaŭda : oni povas eltiri pozitivan funkcion el la utopio, nome tiun, kiu ebligas radikalan kritikon al la subprema kaj punbrida socio, en kiu ĉiu sentas sin enŝlosita. La utopio povus tiam favori "konsciiĝojn", malbloki la energiojn de la "rezignaciemuloj" kaj fatalistoj, mobilizi por vere malsama estonteco : ĝi estas la ilo, kiu kunigas kaj ekagigas. Ekzistas, laŭ tiu vidpunkto, utopio de la memmastrumado, kiun ni ne rifuzas, kondiĉe ke, referencante al ĝi, oni konsentu konkretigi ĝin al eblaj politikaj projektoj. Tiu utopio, cetere, same direktas, pri la esenco, kiel la utopioj de neperforto, anarkiismo, "kunvivebla" socio, ktp... La "utopia" memmastrumado estas ekzemple la imago pri socio, kiu estus sukcesinta malaperigi ĉiujn spurojn de centralizismo, burokratio, hierarkio, kie viroj kaj hominoj, egalaj, vivus sen subpremado, sen estrado, sen trudado, sen ekspluatado, sen alieno,ktp... Tiu utopia vizio pri memmastruma socio neniel konstituas projekton de memmastruma socio, ĉar projekto devas precizigi konkrete, kiaj ekonomiaj, politikaj, sociaj kaj kulturaj organizadoj povas esti proponataj kiel anstataŭrimedoj de la strukturoj de la nuna socio. Ĝi devas proponi instituciojn, kiuj ebligos al la koncernatoj mem diri, kion ili volas. Prefere ol socialismon, kiu antaŭfiksus la organizadon de la estonteca socio, nia projekto ŝatus proponi strukturojn kaj mekanismojn de decidado, kiuj ebligu al la laboristoj kaj civitanoj kontroli, decidi, mastrumi, mem determini la celojn mem de la

socia aktivado.

Povas nur konfirmi en ni tiun juĝon la lego pri la eventoj de majo 68 : ĝuste ĉar la "utopioj" ne kapablis konkretiĝi al politika projekto, fiaskis la movado. Nur la ellaborado de ebla projekto (t.e. kalkulanta kun la tiamaj frontantaj fortoj) evitus la spirmankon de la manifestacioj kaj de la striko, kaj la revenon al la konservativa reakcio . Tiu rimarkigo aperas al ni des pli grava, ke la memmastruma movado originas ĝuste en la eventoj de tiu epoko. Tiel, unu el la unuaj politikaj deklaroj de la sindikato CFDT pri memmastrumado datiĝas je la 16a de majo 1968 : "La industrian kaj administracian monarkion necesas anstataŭigi per demokrataj strukturoj kun memmastrumada bazo."

Devigate navigi inter ambaŭ rifoj, nome la utopio, kiu rifuzas precizigi la strukturojn, kaj la dogmismo, kiu precizigas ilin tro, ni povas skizi nur malperfektan, provizoran projekton...

## Kio estas memmastrumado ?

Unue gravas klarege diferencigi memmastrumadon disde kunmastrumado kaj partoprenado, kiuj estas nur ellaboritaj formoj de la kapitalisma organizado de la laboro. Estas do (ĉu necesas ankoraŭ precizigi tion ?) nenia ebla memmastrumado en kapitalisma reĝimo : neniel donas intereson al la laboristoj memmastrumi entreprenojn, kies profitoj restas ekposedataj de malplimulto. La abolicio de la privata proprieto de la produkt kaj interŝanĝ-rimedoj estas necesa (kvankam ne sufiĉa) kondiĉo por vera memmastrumado. Tial memmastrumado ankaŭ ne estas rimedo por preventi kaj solvi la neeviteblajn konfliktojn, kiuj leviĝas en ŝtateca ekonomio.

Kiam plenumita tiu antaŭkondiĉo, tiam la memmastrumado povas difiniĝi kiel organizado de la ekonomia, socia, politika kaj kultura vivo sin apoganta sur la jenaj tri principoj :

- principo de decidado : ĉiu decido estas farata ĉe la nivelo plejeble proksima al la rektaj koncernatoj, kun samtempa atento al la postuloj de la ĝenerala intereso, kaj al la konkretaj eblo j disdonadi la informaron al ĉiuj decidontoj. Ju pli distribuita la informaro (inkluzive ĝuste pri la postuloj de la ĝenerala intereso), des pli proksima al la bazo povos esti la decidnivelo.

- principo de plenumo kaj kontrolo : la distingo inter decidantoj kaj plenumantoj devas esti plejeble malgranda; memkomprenebl̈e, ĝi neniam povas esti nula : la delegado restas necesa proceduro. Sed ĉiuj responsaj organoj estas elektitaj kaj kontrolataj; ili plenumas - kaj responsas en eksigeblo - la kolektive faritajn decidojn.
- principo de komparado kaj arbitraciado : la decidoj farataj de la multaj kaj diversaj instancoj, ne devige akordas inter si : la konflikto estas neevitebla realaĵo. Konstanta proceduro de komparado kaj arbitraciado estas organizita inter la diversaj decidinstancoj. Restas do rilato inter la bazo kaj la "supro", sed "dum en centralizita sistemo la memstareco de la bazo estas limigita al tio, kion oni ne povis decidi ĉe la supro, en la memmastruma sistemo, la decidoj de la supro limiĝas al tio, kion, per komuna akordo, la diversaj lokaj instancoj decidis meti al pli alta nivelo". (*)

Se la memmastrumado estas unue ia konceptado de la vivo en socio, tia, ke la koncernatoj mem povu decidi pri tio, kio koncernas ilian vivon, ne ekzistas reala memmastrumado, se ĝi ne ampleksas la ekonomian povon, se ĝi ne starigas siajn bazojn en la entrepreno. Sed la memmastrumado ne povas limiĝi al la sektoro de la produktado : ĝi koncernas la rilatojn de la povoj en la tuta socio, ebligas radikalan ŝanĝon en la mastrado de la kreskado dank'al fine demokrata planado, aperigas veran "kulturan revolucion", sen kiu ĝi riskas rapide fiaskegi. Tial la memmastruma socialismo celas kaj preparas samtempe ekonomian rompon, kulturan kaj ideologian revolucion, socian kaj politikan transformadon; niaflanke, ni aldonas, ke ĝi devas antaŭvidi tipon de defendo tute novigitan kompare kun la klasikaj konceptoj, kalkulantan samtempe kun la "strategiaj" postuloj kaj kun siaj propraj politikaj principoj (vd. ĉap.4).

## 2. La ekonomia povo

### La socialigo

Kiel fari, por ke la proprigado de la produktrimedoj far la laboristoj estu reala, ne nur jura ? Tio estas ĉefa

---

(*)E.MAIRE kaj J.JULLIARD, La CFDT d'aujourd'hui, eld.Seuil 1975, p.184.

demando, al kiu - necesas ja agnoski tion - la socialistaj spertoj ne vere donis al ni sufiĉajn respondojn, ĝis nun ... La abolicio de la privata posedo de tiuj rimedoj ne sufiĉas, por ke ĉesu aŭtomate ĉia ekspluatado kaj ĉia alieno, eĉ en socialisma reĝimo. Nu, por kio utilas senproprietigi la kapitalistojn, se la laboristoj ankoraŭ ne havas la rajton diri sian vorton, se la decidoj restas ekster ili, kaj se restas fabrikataj la samaj produktoj en same funkcianta entrepreno ? Por kio utilas senproprietigi la kapitalistojn, se la produktadteknikoj (maŝinoj, fabrikprocedoj) kaj la organizsistemo de la laboro (daŭrigante la labordividon) restos tiaj, kiaj ili estas nun, spegulos la hierarkiajn rilatojn de estrado kaj ordonado ? Ĉu faklaboristoj ĉe ĉeno povas sen ŝanĝo proprigi al si produktrimedon, kiu estas ilo de ilia alieno ?

La proprigado de la produktrimedoj tial larĝe superstaras la nuran demandon pri jura proprieto : por la laboristoj temas pri la mastrado de la organizo de la laboro, kaj ili devas proprigi al si la produktadon, t.e. produkti la varojn havantajn realan socian utilon.

Necesas do kritikadi la koncepton mem de <u>proprieto</u>. Ne temas nur pri ŝanĝo de la posedantoj de "proprietrajtoj". La dirmanieroj "socialigo" aŭ "socia proprieto", kvankam tre preferindaj al la vorto "naciigo", restas tamen maltaŭgaj, ĉar ili ne atakas la juran koncepton pri "proprieto". La koncepto "malproprietigado", proponita de E.MAIRE kaj J.JULLIARD povas montriĝi utila, laŭmezure kiel ĝi rompas la ligon inter proprieto kaj povo : "ĉar la proprieto ne estas simpla koncepto; ĝi estas precipitaĵo de la sistemo de kapitalistaj valoroj, kaj enfermas en si serion da privilegioj, da ekscesegaj rajtoj streĉe kunligitaj kun realaj funkcioj de ĉiu produktanta socio. Tiun malsimplan tuton necesas eksplodigi por finalveni al nova disdonado de la diversaj funkcioj de la proprieto. En memmastruma socio, la diversaj povoj, **kiujn** la proprieto liveras al sia posedanto, estos dispartigitaj inter diversajn memmastrumajn decidejojn." (el la sama libro, p.183).

La povo de la laboristoj en ties entreprenoj ne havas kiel bazon juran kolektivan proprieton, sed la fakton, ke ili tie laboras. La socialigo difiniĝas do per aro da rilatoj (ekonomiaj, politikaj kaj juraj) inter homoj, kiuj kune disponas pri produktrimedoj por labori kaj produkti varojn aŭ servojn.

Survoje al tiu socialigo, la naciigo povas, iukaze, konsti-

tui peran strategian celon : se ĝi ne limiĝas al la anstataŭigado de la mastra povo per la ŝtata, se ĝi estas akompanata de procezo el prenado de realaj povoj super kaj en la entrepreno, tiam naciigo povas konduki al socialigo.

Memmastrumado en la entrepreno

De la rekta demokratio al la delegado.

Ĉiufoje, kiam eblas, ĉies partopreno al decido estu rekta. Nur per la praktikado de tiu rekta demokratio efektiviĝas la ligo inter privata kaj publika interesoj; tiu praktikado ebligas al ĉiuj formiĝi, informiĝi, kaj tiel povi juĝi pri pli ampleksaj problemoj. Sed ne ĉie oni povas praktiki tiun "rektan demokration" : la multeco de la solvendaj demandoj implicas la ekziston de multaj decidniveloj, kaj la amplekso mem de la memmastrumendaj sektoroj ofte malebligas la konkretan kuniĝon de ĉiuj koncernatoj.

Do nepre necesas sin turni al formoj de delegado. Sed tiu delegado intervenas nur, kiam la laboristoj agnoskas la maleblon de rekta demokratio, kaj laŭ proceduroj de ili difinitaj. Krome, la laboristo ne fordonas sian povon al delegito, kiu reprezentas lin tute, sed nur pri unu el liaj funkcioj; pri alia funkcio reprezentos lin alia homo. En ĉiu kazo, li estos kondukita pripensi la socian funkcion kaj juĝi konkrete, persone, tiun, al kiu li donas prokuron. Tiu memmastruma sistemo radikinta en la rekta demokratio ĉe la bazo, akceptante reprezentantojn nur pri funkcio post funkcio, sen tuta fordono, postulas radikalan restrukturadon de ĉiuj institucioj, sed nur ĝi certigas ĉies realan formiĝon.

La decidstrukturoj

Pli konkrete, ni povas proponi, kiel ekzemplon, sen antaŭjuĝi pri kio estus preferinda ĉe ni, la organizon de la povoj en jugoslava entrepreno :

La supera instanco estas la laborista kolektivo, ĝenerala asembleo de la laborantaro de la entrepreno. Ĝi estas la leĝa fonto de la povo en la entrepreno. Ĉiuj decidoj, kiuj ligas la entreprenon por la estonteco, koncernas ĝin. Ĝi povas decidi per referendumo, aŭ per la kunsidoj de la laboristoj en la diversaj partoj de la entrepreno.

Pro la multeco de siaj membroj kaj la malproksimeco de diversaj laborejoj (fervojo, navigado, grandaj konstruentre-

prenoj, ktp), la laborista kolektivo ne povas ofte kuniĝi. Aliflanke, multaj estas la decidoj, kiujn estus malracie, eĉ malutile, fari rekte : tro malrapida, tiu metodo riskus estigi haltotempojn en la produktado, danĝere prokrasti iujn urĝajn decidojn, ktp... Nepre necesas do funkcii per delegadoj, reprezentadoj, balotoj, kiuj enigas en la entreprenojn diversajn instituciajn instancojn. La laborista kolektivo devas konfidi grandan parton el siaj memmastrumaj funkcioj al mastrumorganoj. Por tio ĝi nomumas, per sekreta balotado, la laboristan konsilion, pri kiu ĝi konservas rajton de kontrolo kaj eksigo. La laborista konsilio respondas proksimume al tio, kio estas administracia konsilio en kapitalista entrepreno. Ĝi faras la bazajn decidojn rilatajn al la ĝenerala politiko de la entrepreno.

La laborista konsilio nomumas la mastruman komitaton, kiu estas esence organo de plenumo de la laborista konsilio. Ĝi estas ĉiujare elektata el inter la membroj de la laborista konsilio kaj la aliaj laboristoj de la entrepreno. Ĝiaj membroj estas kontrolataj kaj eksigeblaj far la laborista konsilio.

La direktoron nomumas miksa komisiono konsistanta duone el membroj de la laborista konsilio kaj duone el elektitaj reprezentantoj de la komunumo, de la regiono aŭ de la ŝtato (laŭ la amplekso kaj graveco de la entrepreno). Lia elekto, baze de publika konkurso, devas esti submetata al perioda reelekto. Li estas rajta membro de la mastruma komitato, sed ĝuas neniun specialan rajton. Helpate de teknikista skipo, li aplikadas la decidojn de la laborista konsilio kaj de la mastruma komitato, organizas kaj kondukas la produktadan procezon. En kazo de kontesto inter la laborista konsilio kaj la direktoro, oni sin turnas al la arbitracio de la komunumo (aŭ de la regiono, aŭ de la ŝtato).

## Eviti la burokration kaj la teknokration.

La elekto de responsaj organismoj far la laboristoj ne solvas ĉiujn problemojn de la demokratio en la entrepreno : kiel eviti, ke la rilato "elektantoj-delegitoj" ne ripetu la rilaton "estratoj-estroj" ? Unue, rifuzante la tutan, konstantan, profesiigitan delegadon; malpermesante la kumulon de la delegadoj kaj efektivigaj taskoj; zorgante pri reala rotacio de la responsoj; konservante striktan kontrolon de la elektitoj far la elektintoj, kun eksigeblo kiel puno. Oni povas eĉ konsideri, en iuj kazoj, la sistemon de la "deviga mandato kun kalendaro", t.e. ke la eksigo estus aŭtomata, se la delegito ne plenumus, en tempo fiksita de liaj elektintoj, la taskojn, kiujn ili kon-

fidis al li per mandato.

Tiel konceptite, la delegado povas ebligi starigadon de sistemo de reprezentado tre malsama de tiu, kiun ni konas en niaj okcidentaj demokratioj : la elektoj ne plu estus tie periodaj konsultadoj de la amaso de la civitanoj izolitaj kaj politike malkleraj pri personoj, kiuj poste tute eskapas el ilia kontrolo. La balotrajto reprenus sian plenan signifon : esti ilo inter aliaj, ebliganta al la laboristo en la entrepreno kaj al la civitano en la lando, praktikadi la memmastrumadon.

Sed ne sufiĉas eviti la alproprigadon de la povo far la delegitoj; necesas ankaŭ konsideri la riskon vidi la teknikajn spertulojn preni, pro sia kompetenteco, troajn povojn, kreante tiel novan teknokration. La rolo de la spertuloj devas do esti limigata al la alporto de teknikaj konoj al la laboristoj kaj civitanoj : ilia interveno situas ĉe la nivelo de la proponoj kaj konsiloj, dum la decido ĉiam restas sur la tereno de la kolektivo kaj de ĝiaj elektitoj. Tiu danĝero estos notinde limigata per la disvolviĝo de la konstanta klerigado, kiu, kreskigante la kapablon de kolektiva decidado de la laboristoj, evitos, ke la laboristoj elektus preskaŭ sisteme siajn inĝenierojn (kiel nun en Jugoslavio). Se ne, oni rekreus la dividon inter "tiuj, kiuj scias" kaj "tiuj, kiuj ne scias", kaj do novan formon de hierarkia povo : la superregado per la funkcio anstataŭus la superregadon per la proprieto.

Por ke cirkulu pli bone la informo necesa por vera partopreno de ĉiuj laboristoj en la debatoj kaj decidoj, oni povas starigi "laborunuojn" pli malgrandajn ol la entrepreno, ĝuantajn relativan memstarecon rilate al la labororganizado kaj la interna regularo. Ĉiu povus tie taksi pli konkrete la kondiĉojn kaj rezultojn de la faritaj decidoj.

Ĉiuj tiuj strukturoj kaj proceduroj devas ebligi radikale aliigi la kondiĉojn kaj la celojn de la laboro; la diserigado de la taskoj, la stultigaj kadencoj, la malbonaj psikologiaj kaj fiziologiaj laborkondiĉoj, la senresponsa obeado devus malaperi; la pripensado pri la celoj de la produktado devus esti okazo de debatoj inter la konsilioj laboristaj kaj la diversaj organizoj ligitaj kun la distribuado.

La memmastrumado ekster la entreprenoj.

La memmastruma funkciado aplikiĝas ankaŭ al ĉiuj sferoj

de la socia aktivado : universitatoj, lernejoj, malsanulejoj, socia asekuro, ktp... La sciencaj, kulturaj, edukaj aktivadoj devas esti liberigitaj el la administracia kuratoreco de la Ŝtato, por esti prizorgataj far tiuj, kiuj praktikas ilin, sub la kontrolo de la tuta socianaro : ankoraŭ pli ol en la produktad-sektoro, la memmastrumado devas koncerni, en tiuj sektoroj, ne nur tiujn, kiuj laboras en ili, sed ĉiujn uzantojn de iliaj servoj. Ekzemple, la edukado ne povos esti mastrumata nur de la instruistoj, eĉ kun la "partopreno" de la lernantoj kaj de iliaj gepatroj : la servo, kiun ĝi certigas, koncernas la tutan socion kaj estas normale, ke ĉiuj civitanoj havu la rajton diri sian vorton pri ĝiaj celoj kaj ĝia organizado. Same pri la sano, la informado, la "sekureco" de la personoj, ktp...

La planado.

Sen planado, la memmastrumado povus konduki al socialismo de memstaraj kaj konkuraj unuoj, kie la plej malgrandaj kaj plej malfortaj entreprenoj kaj regionoj estus malfavorataj. Ĉar la libereco sen socia kontrolo riskas estigi restarigadon de la malegalaĵoj kaj privilegioj. Estas do nepre necese, meti la memmastrumadon interne de procezo de demokratia planado, kiu certigu la koheron de la aktivadoj de la diversaj entreprenoj.

Se la necesa planado limiĝas al la kolektiva interkonsiliĝado pri la unuaecaj rajtoj decidendaj ĉe la ekonomia aktivado, se ĝi ne estas akompanata de profunda transformado de la organizado de la entrepreno, de la produktad-rilatoj kaj de la tuta hierarkia sistemo, ĝi riskas estigi revenon de la burokratio, kaj poste de la totalismo. Planado kaj memmastrumado estas do streĉe ligitaj kaj kondiĉas unu la alian.

La celo de la planado estas la kunordigo de la ekonomia kaj socia disvolviĝo ĉe la nacia skalo. Ĝi malhelpas, ke la multeco de la decidlokoj estigus malŝparan malordon, ĝi faciligas la malpligrandiĝon de la produktad-unuoj kaj ebligas loki racie la gravajn unuojn.

Por tio, ĝi devas sin apogi sur :

- la kono de la realaj bezonoj, esprimitaj ĉiunivele far la produktantoj, la konsumantoj, la uzantoj de la servoj, la tuta civitanaro.
- la sociaj celoj deciditaj per la planoj naciaj, regionaj kaj lokaj. Cetere, iuj elektoj ne povas esti farataj nur ĉe la loka aŭ regiona nivelo : ili necesigas, lastinstance, decidon ĉe la nacia nivelo. Ekzemple :
- la celoj de kreskado de la suma enspezaro, kaj la manieroj

ĝin disdoni inter la individuoj, la komunumoj, la regionoj.
- la kolektiva mastrado super la investado.
- la malgrandigo de la malegalaĵoj (notinde inter la regionoj).
- la determinado de sektoroj eskapigendaj grade el la komerca ekonomio kaj "socialigendaj".
- la konsiderado al la internacia kunteksto, kiu limigas la eblaron.
- la redifinado de tipo de disvolvado, kiu ĉesigu la ekspluatadon super aliaj landoj; la starigado de novaj rilatoj inter la nacia ekonomio kaj la cetera mondo, speciale la evolulandoj.

La demokratia ellaborado de plano supozigas malcentralizitajn strukturojn ebligantajn esprimi la bazajn bezonojn plenumendajn je preciza estonteco. Estos do lokaj kaj regionaj planoj ellaboritaj far memmastrumataj entreprenoj, far lokaj kolektivoj : daŭra procezo de diskutadoj, arbitraciadoj kaj decidadoj devos ebligi la harmoniigadon de tiuj multaj planoj kaj ilian enmeton en la nacie fiksitajn orientiĝojn. Tiel la demokratia planado ebligas la esprimadon de vera elekto de socio, de tipo de kreskado volata kaj ne trudata : la vere politika eco de la ekonomiaj elektoj estos pli bone sensata kaj responsata de ĉiuj.

Konkrete, tiu harmoniigado de la planoj povus plenumiĝi per du serioj da rilatoj : horizontalaj, vertikalaj; horizontale, ĉiu decid-unuo (entrepreno aŭ komunumo) informiĝas tre vaste pri tio decidata de la najbaraj aŭ similaj unuoj; vertikale, ĉiuj plan-projektoj estas kunigitaj kaj komparataj ĉe supera nivelo. Kia ajn ĝi estas, gravas, ke la procezo de ellaborado de la Plano ebligu al ĉiuj esprimi siajn bezonojn kaj siajn elektojn (eĉ malsamcelajn), ne nur pri la lokaj aŭ regionaj problemoj, sed ankaŭ pri la grandaj naciaj politikaj orientiĝoj pri defendo, justico, sano, instruado, urboplanismo, kolektivaj ekipaĵoj, ktp...

Socialigo, memmastrumado, planado : tiujn tri elementojn oni ne konsideru aparte. Ĉiu el ili, se izolita, povas estigi gravajn riskojn aŭ tute nenion ŝanĝi... Kune, ili povas eviti drivon al burokratio, al totalismo, aŭ al la iluzio de memmastrumataj "aŭtarciaj" eroj. Skizante maldetale tiun "ekonomian projekton", ni ne pretendas fari originalan verkon : ni reuzas, por la esenco, la aksojn de pripensado de

la organizoj, kiuj, de hodiaŭ, esploras pri kio povus esti socialismo fine demokratia. Sed ni opinias tiujn precizigojn necesaj por pli bone difini la signifon de nia neperforta elekto : kiam oni scias, ke la perforto instituciiĝas en la interhomaj sociaj kaj ekonomiaj rilatoj, serĉi soci-organizadon kiu malgrandigas tiom, kiom eblas (bedaŭrinde neniam tute) la parton de "struktura" perforto, tio estas konsistiga parto de la neperforta lukto.

## 3. La politika projekto.

### Al detruiĝo de la ŝtato

La ŝtato ne estas neŭtrala : ĝi ne estas "ilo", kiun la burĝaro akaparis, kaj kiun sufiĉus "redoni" al la laboristoj. Se la kontrolo, kaj poste la konkero de ĉiuj "ŝtataparatoj", restas necesaj strategiaj celoj, tio estas multe pli por senigi la regantan klason je la iloj de ĝia povo, ol por starigi memmastruman reĝimon : de la komenco estas ia kontraŭdiro inter la strategia neceso mastri la ŝtatpovon tian, kia ĝi estas, kaj la neceso transformi ĝin radikale plejeble rapide, por ne starigi centralizisman kaj burokratan socialismon. Tial, estos vivdecide certigi, tuj kiam eblos, la kontrolon, la mastradon kaj la transformadon de la ŝtatstrukturoj, kaj tiuj tri celoj estas ja ligitaj. Poste, per la disvastigado de la memmastrumado al la politikaj, administraciaj kaj financaj institucioj, efektiviĝos grade la "detruiĝo de la ŝtato", t.e. la anstataŭado de la ŝtato, kiel ilo por la klasa regado, per instanco komisiita por centre kunordigi la diversajn kaj multajn bazajn povojn. Ne temas pri revado pri la malapero de ĉia centra povo, sed pri alia redisdonado de ĉiuj funkcioj, kiujn la ŝtato uzurpis kaj centralizis, kaj kiuj restas necesaj en ĉiu ajn socio : la funkcioj de arbitraciado, de disdonado, de konservado de la sekureco, de ekstera defendado, ktp...

### Novaj politikaj strukturoj

La agnosko pri kelkaj necesaj "funkcioj" de la ŝtato rekte trudas la elekton de starigendaj strukturoj kaj institucioj. Socialisma povo celanta la memmastrumadon devas do rezolute malfermi la vojojn, kiuj kondukas al novaj sociaj rilatoj kaj al novaj pov-strukturoj; ĝi devos, por tio, kunordigi la diversajn popolajn iniciatojn. La centraj organismoj estas tiam konceptitaj kiel iloj, kiuj devas certigi la antaŭkondiĉojn necesajn por la disvolviĝo de la libera aktiveco de la laboristoj

kaj civitanoj.

La novaj strukturaj kaj politikaj institucioj devos esti organizataj, ili ankaŭ, laŭ la principoj de la memmastrumado : tio estas por suma kohero de la socia organizo, sed tio estas ankaŭ la kondiĉo de la ekonomia memmastrumado. La laboristaj konsilioj estus rapide senpovigitaj, aŭ fariĝus nuraj manovramasoj manipulataj de aliaj povoj, se la tuta socio ne estus organizita laŭ la sama maniero.

La socipolitika kolektivo plej proksima de la civitano, tiu, pri kiu li povas praktiki realan rektan povon, estas la <u>komunumo</u>. Ĝi devas do fariĝi la baza strukturo de memmastruma politika organizo. Ne necesas diri, ke, rilate al la nuna sistemo, tio supozigas notindan kreskadon de la povoj kaj atribuoj de la komunumoj, pligrandigon de ilia financa memstareco, malaperigon de diversaj administraciaj "kuratoroj", kaj redifinadon de la grandeco de la komunumoj (la urbegoj povus konsisti el pluraj komunumoj). En sia funkcimaniero mem, la komunumo devus grade kunordigi la aktivadon de la diversaj memmastrumaj organoj ekzistantaj sur sia teritorio : laboristaj konsilioj, komitatoj de uzantoj, kvartalkomitatoj, reprezentantoj de partioj kaj sindikatoj, de kulturaj asocioj, ktp...Reprezentantoj elektitaj de tiuj diversaj grupoj povus konsistigi la komunuman asembleon, kun la reprezentantoj rekte elektitaj de la civitanoj. Fakte, en la kadro de la komunumo kiel asocio de laboristoj kaj civitanoj povas harmoniiĝi la sociaj bezonoj de ĉiuj : la laboristoj povas praktiki efektive sian socian kontrolon pri la uzado de la produkto de sia aktivado ĉe la plej proksima nivelo, kaj de tie supreniri al la regiona kaj nacia niveloj.

Samtempe kun tiu nova formo de municipa povo devas ekstari la instancoj de <u>kontrolo</u> de tiu povo : kunvenoj de elektantoj povus ebligi regule al la civitanoj partopreni rekte en la decidoj pri la socipolitikaj orientiĝoj kaj prezenti proponojn. Oni povus proponi, ke iuj decidoj postulu nepre la opinion de la kunvenoj de elektantoj : ekzemple, pri la akcepto de la buĝeto, de la urbanizplano, de la impostoj, ktp...

Tuj kiam la politikaj kaj kulturaj kondiĉoj por pli larĝa memmastrumado estos plenumitaj, tiam oni transiros de la komunuma nivelo (kie la memmastrumado estas plej facile starigebla, eĉ rapide) al la niveloj regiona, kaj poste

nacia. En tiu procezo, gravas, ke ĉiuj instancoj devenu, rekte aŭ malrekte, de la komunumoj.

La civitanoj povu praktiki veran kontrolon super siaj reprezentantoj en la diversaj instancoj, kie estos farataj la politikaj decidoj, kio sekvigas, ekzemple, la malaperon de la departementestro kiel ekzekutiva peranto de la Ŝtato, kaj la transdonadon de liaj funkcioj al la regiona asembleo. Ankaŭ tie trudiĝas la samaj reguloj de kontrolo de la elektitoj kaj limigo de iliaj povoj (limigitaj mandatoj, rotacio de la respondecoj, neprofesiuligado, eksigeblo), kiuj trudiĝis en la entrepreno. Kiam sufiĉa nombro da civitanoj postulas tion per peskribo, novaj elektoj devas okazi. Tiel, la voĉdono ne plu estas blanka ĉeko donata al la elektoto : ĝi alprenas tute alian signifon, ĉar ĉiu voĉdonanto scias, ke li praktikas veran povon per kiu li influas konkrete al la kondiĉoj de sia laboro kaj vivo. Oni povas eĉ antaŭvidi, kiel en la hodiaŭaj Svisio kaj Italio (tamen ne memmastrumaj !), ke la civitanoj ĝuu la rajton de iniciato : kondiĉe de certa nombro da subskriboj, ili povas proponi al la ĝenerala balotado leĝproponon aŭ la nuligon de balotita leĝo.

Tiel, la memmastrumaj institucioj kaj kondutoj spertataj ĉe la laborunuo kaj en la komunumo ebligas fondi ĉiujn formojn de socipolitikaj institucioj je ĉiuj niveloj. Sed tiu sistemo supozigas, ke estu vaste kunakceptita alia koncepto pri la "politiko"; ĝi supozigas ankaŭ, ke la politikaj partioj, la sindikatoj kaj la diversaj organizitaj fortoj funkciu vere demokratec kaj memmastrume.

## La prem-institucioj

La socialisma memmastruma socio ne estas tiel krimnaska, kiel la socio, kiu hodiaŭ estas nia; sed la malapero de ĉefaj sociaj kialoj de delikto ne sufiĉas por ĝin malaperigi tute : restos ekzemple la patologiaj kialoj. Neniam do estos vere solvita la problemo de la sekureco. Sed necesos trovi por ĝi solvojn, kiu ne estu, pro sia malestimo al la homo, tute kontraŭaj al la socialista idealo. Ne sufiĉos do abolicii la mortpunon : necesas kritikegi la principon mem de la malliberejo, sistemo, kiu enŝlosas enkarcerigitojn kaj gardantojn en la humiliĝo kaj timo, sistemo de detruo de la personeco, kie triumfas la leĝo de la plej forta, sistemo cetere senefika, ĉar estas 47 % da rekulpintoj...

Necesos ŝanĝi radikale ankaŭ la manieron kuraci la "mensmalsanulojn" : izoli ilin for de la socio ne ŝajnas

la plej bona rimedo por resanigi ilin, kaj tio kondukas al sistemo de aziloj tute proksima de la karcera sistemo.

Alia koncepto pri politiko

En socialisma socio, la partioj, la sindikatoj kaj la diversaj organizoj riskas ludi la rolon de ideologiaj kaj politikaj aparatoj de la ŝtato. Tial la povo de la laboristoj kaj civitanoj, evitante limigi sin al la strukturoj de produktado kaj povo, devas plivastiĝi ĝis iliaj organiziloj mem. Tio postulas notinde :

- ke neniu organizo posedu forton tian, ke ĝi povus trudi sian volon al tiuj, kiuj ne estas ĝiaj membroj;
- ke la sindikatoj ne rolu kiel "transsendiloj", sed kiel kontestiloj stimulantaj la memmastrumadon. Ili estu speco de defenda kontraŭpovo por la plej malfavorataj laboristoj, kaj ebligu formadon al la memmastrumado kaj al la ekonomio. Sen ili, teknokratoj povus grandigi sian povon en la industrio, dum korporaciemo aperus en la publikaj servoj.

Pri la partioj, ili sin difinu ne plu kiel iloj por la povo, sed kiel iloj por la mobilizado de la amasoj. Necesos eviti, ke la samaj personoj respondecu samtempe pri gravaj funkcioj en partio kaj en la ŝtato. La partio tiam estas moviĝanta : dum ĝi laboras por transformi la ŝtaton, samtempe ĝi transformas sin mem, tiel preparante sian propran detruiĝon kiel politika forto distinga de la laboristaj kaj civitanaj kolektivoj.

4. La kultura projekto

La kapitalismo sukcesis meti al sia servo ne nur la produktan aktivadon de la homo, sed ankaŭ liajn formojn de vivo kaj de penso, lian kulturon. Projekto anstataŭigi la kapitalismon ne povas kontentiĝi, proponante aliajn manierojn produkti kaj organizi la socion : "kultura revolucio" estas necesa.

Mastri la celojn

La kulturo fariĝis komercaĵo : la scienca kaj teknika esplorado estas celo per si mem, sen konsidero pri ĝiaj konsekvencoj ĉe la estonteco de la homo. Pro la konkurado inter la individuoj, inter la entreprenoj, inter la nacioj,

neniu plu faras decidon pri la celoj, sed nur pri la rimedoj de la kreskado kaj de la profito. Nu, temas ja unue pri demando pri la celoj : malantaŭ ĉiuj kritikadoj al la senlima, nemastrata kreskado, estas ne nur maltrankvilo pri la elĉerpiĝo de la naturaj riĉaĵoj, pri la poluado, pri la atencoj kontraŭ la "vivkvalito"; estas ankaŭ, ofte mallerte esprimata, la deziro mastri la sumajn celojn de la homaj aktivadoj, kaj ne nu iliajn manierojn. Ĉar la kapitalisma racieco kondukis nin al tiu absurda situacio, ke ni estas kaptitaj en sistemoj perfek raciaj je siaj procedoj, sed tute sensencaj je siaj celoj.

Kion ni bezonas, tio estas do anstataŭrimedo, ne nur al la kapitalisma sistemo, sed al la civilizacio, kiun ĝi naskis ka trudis al la tuta mondo. Tiu anstataŭa civilizacio ebligu la unueciĝadon de la homo en ties diversaj funkcioj : li estu ne nur laboristo, aŭ nur studento, aŭ nur instruisto, ktp... La nuna socio estas konstruita sur la principo de la labordivido kaj de la fakiĝo; tiu, kiun ni volas, devos ebligi al ĉiu diversigi siajn aktivadojn, laŭmezure kiel li aŭ ŝi tion volos, por kreskigi sian kapablecon de iniciato kaj memstareco.

## La necesa malkondiĉado

Tiu nova civilizacio grade kaj senregulare inventenda, postulas profundan malkondiĉadon rilate al multaj ideoj, konduto, konvinkoj, kiuj ŝajnas "memkompreneblaj". Kaj unue, ĝi supozigas liberigadon rilate al la fatalismo, al la rezignemo, al la senkonvinka kredo, ke "nenio povas ŝanĝiĝi...Ĝi supozigas ankaŭ, ke estu rompita la erarocirklo de la perforto, de la t. mo kaj de la rezignemo : la perforto naskas la timon, la timo paralizas kaj restigas en la rezignacio, la rezignacio ebliga la konstantecon de la perfortsituacioj... Tial la pruvado de la efikeco de neperforta anstataŭrimedo - kiu liberigas el la timo kaj la rezignemo - ŝajnas al ni necesa por tiu malkondiĉado.

En la kapitalisma socio la motoro de la ekonomio estas la serĉado de la profito. La reganta ideologio trudas al ĉiu laboristo difinitan tipon kaj difinitan kvanton de laboro, per diversaj rimedoj (timo de la senlaboro, vetkurado al la konsu ado, sanktigado far la Eklezio : "vi perlaboros vian panon pe la ŝvito de via frunto", aŭ per la lernejo, ktp...)Ilin ne dev anstataŭi socialisma konkurado, kiu estus sama kiel alia sa igado de la laboro, kaj kontestus nek la diserigadon de la t koj , nek la dividon inter manlaboro kaj intelekta laboro, ne

la malegalecon de la enspezoj, kiun oni pravigas nun per la responso aŭ la daŭro de la formado.

Repensi la edukadon

Granda parto de tiuj "kondiĉadoj" venas de la eduka sistemo kaj de ties enhavo. Se oni volas, ke la edukado preparu por memmastruma praktikado, ke ĝi donu la plej larĝan informon, ke ĝi favoru la kolektivajn decidojn, necesas ŝanĝi profunde ĝiajn celojn, ĝiajn metodojn, ĝiajn programojn kaj strukturojn. Gravegas ankaŭ forigi la disecon inter manlaboro kaj intelekta laboro. Ne temas trudi al ĉiuj la saman tipon de instruado, sen konsideri la ŝatojn kaj la kapablojn, sed forigi la tro fruan specialistigon, kiu senigas la "intelektulojn" je ĉia devo labori per siaj manoj, kaj kiu kreas en la tuta socio antaŭjuĝon pri la hierarkia supereco de la intelektulo kontraŭ la manulo.

Samspirite, oni organizos la formadon, evitante la principon de la "plena tempo" : la "instruistoj" povus esti laboristoj, sciencaj esploristoj, sindikatistoj, ekonomikistoj, artistoj, ktp..., donantaj al la instruado parton de sia tempo. La rotacio de la taskoj revalorigus tiel la manajn aktivadojn kaj ebligus al la enhavoj de la instruado senĉesan reaktualiĝon. La "konstanta formado", hodiaŭ uzata por adapti la laboristaron al la bezonoj de la produktado, devus fariĝi loko por konstanta memformado, kie la interŝanĝado de la spertoj kaj kompetentoj ebligus al la plimulto mastri la plej gravan parton de la konoj necesaj por la memmastrumado : ĉiu povu juĝi per si mem la proponitajn elekteblojn, iliajn celojn, iliajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Tiu konstanta formado estu ankaŭ privilegia loko por pripensado pri la celoj, por tiu memdeterminado de la celoj, sen kiu memmastrumado ne havas grandan signifon.

Mastri la teknikon

Ni rifuzas diri la teknikan disvolviĝon responsa pri ĉiuj malbonoj, kiujn suferas nia civilizacio. Sed ni rifuzas ankaŭ konsideri la teknikon io "neŭtrala", kiun sufiĉus meti al la servo de la socialismo, por ke ĉio en ĝi iĝu bonfara. Estas teknikoj, kiuj, per sia funkciado mem, starigas politikajn kaj ekonomiajn strukturojn malebligantajn aŭ tre malfaciligantajn memmastruman funkciadon de la socio : ekzemple, la atomcentraloj... Sed estas aliaj tek-

nikoj, kiuj, per streĉa kontrolo de la laboristoj, povas fav-ri la memmastrumadon : la telekomunikadoj, la informadiko...

Ekzemple, la disvolvado de informadiko povas liberigi la homon el la neceso amasigi konojn, kaj tiel ebligi al li koncentriĝi pri tio, kio estas esence homa : meti la demandojn kaj decidi pri la celoj. La freŝdataj teorioj pri informadiko konstituas realan alporton al la memmastruma projekto. La telekomunikoj ebligas realigi rapide kaj efike tiun interkonsiliĝon inter la diversaj instancoj de la memmastrumado, sen kiu oni falas en la malordon aŭ la aŭtarcion. Ili favoras funkciadon de la socio, kie la mesaĝo transdonas, ne pli tiom da plenumendaj ordonoj, kiom da informoj pri la bezonoj kaj projektoj de unuj kaj aliaj.

Aliaj teknikoj, ekzemple la perkabla televido, povas ebligi la partoprenon de la plimulto en la informado kaj en la kultura kaj politika vivo de malgranda kolektivo (mezgranda urbo, kvartalo).

La uzado de tiuj diversaj teknikoj, laŭ memmastruma perspektivo, supozigas, ke ili ne estu proprigitaj far la teknikisto. Necesas sin gardi kontraŭ la stariĝado de klaso, kiu estrus p la funkcio, anstataŭ klaso, kiu estris per la proprieto.

<u>Daŭrigi la disvolvadon, sed alimaniere</u>

La postuloj de la kreskado trudiĝis kiel modelo de civilizacio. Laŭmezure kiel la nuna krizo trafas tiom la civilizacion kiom la ekonomiajn kaj politikajn modelojn, ĝi trafas ĉiujn aspektojn de la vivo. Ne eblas nei, ke la industria disvolviĝo plibonigis iujn aspektojn de la homa kondiĉo; sed faliĝas urĝe remeti la ekonomian kreskadon al la servo de la homoj. Nia socialismo ne povas esti konceptita kiel pli efika maniero plenumi la bezonojn kreitajn de la kapitalismo : ĝi ne estas plibonigita mastrumado de la kapitalisma kreskado. Ni ne povas konsenti plu labori pli multe por produkti pli multe, dum alia tipo de organizado, forigante la malegalecon antaŭ la laboro kaj antaŭ la konsumo, ebligus plibonigi la vivnivelon de la tuta laboristaro, reduktante la labortempon.

Sed tio supozigas la forigon de la socie malutilaj produktadoj kaj la difinadon de la ekonomiaj celoj elde la realaj bezonoj, ne elde la bezonoj vekitaj per la reklamado aŭ la etos ideologio. Por tio, estas necese, ke la produktadon determinu ne plu la serĉado de profito, sed la plenumado de la bazaj bezonoj homaj. Ni do tute ne proponas fali en la iluziojn de la "nula kreskado", ĉar, se iuj ekonomiaj aktivadoj devas esti

reduktitaj aŭ grade forigataj (unue la armil-fabrikado), aliaj devas esti disvolvataj aŭ kreataj. La nula kreskado estas nur la malbona respondo alportita de la liberala ekonomio al la problemo, kiujn ĝi mem kreis per la logiko de la profito kaj la forlaso de la ekonomiaj decidoj al la nuraj mekanismoj de la merkato.

En memmastruma socialismo, la kreskado estus prefere kreskado diversigata laŭ la ekonomiaj ebloj (inter kiuj necesas ekde nun kalkuli la "limojn" trudatajn de la fakto, ke la tero ne estas senlima provizujo) kaj laŭ la realaj bezonoj de la kolektivoj : konsumado, sed ankaŭ vivkadro, laborkvalito, respekto al ia ekologia ekvilibro, al bela ĉirkaŭaĵo, ktp... Ĉar ĉiuj tiuj elementoj devas de nun interveni en la ekonomia decidado.

Por alia vivstilo

Tipo de socia organizo, kia ajn ĝi estas, ne devas determini la stilon de vivo, kiun ĉiu homo aŭ ĉiu grupo deziras alpreni. Sed ni deziras, ke la tuto de la memmastrumaj strukturoj kaj funkciadoj favoru la inventadon de nova stilo de kolektiva vivo, sen iel trudi ĝin al iu ajn. Tiu vivstilo baziĝus sur nova sento de "solidareco" (kiu povas esprimiĝi per komunumaj vivmanieroj), sur repravigado de la festo kaj de la arta kreado, sur reekvilibrigado de la labortempoj, de la libertempoj kaj de la tempoj por interŝanĝoj...por ke "vivi" ne plu signifu "akiri vivrimedojn".

***

# ĈAPITRO 3

*********

## PROPONOJ POR STRATEGIO DE TRANSIRO AL LA SOCIALISMO

Antaŭa noto de M.A.N.

Difini, proponi kaj ekfunkciigi strategion de transiro al la memmastruma socialismo estas tasko, kiu postulas la kundebatadon kaj kunlaboradon de ĉiuj fortoj, kiuj celas tian socialismon. MAN ne intencas do difini ĉi tie strategion, kiun ĝi provus ekfunkciigi sole ! Sed, ĉar ĝi volas esti, meze de la memmastruma movado, strukturo por agado kaj proponado pri la punktoj, kiuj, pro nia neperforta elekto, pli speciale interesas nin, ni opinias, ke ni havas demandojn por meti kaj proponojn por fari. Laŭmezure, kiel la transiro al la socialismo estas, iamaniere, jam komencita, tiu debato pri la strategio ne estas nure teoria : ekde nun, per niaj luktoformoj, niaj celoj, niaj organizmanieroj, ludiĝas la elekto inter diversaj tipoj de "socialismo". La proponoj, kiujn ni faras ĉi tie, ne estas do sen ligo kun frutempe aplikebla strategio.

Ni scias, ke ĉian teorian debaton finfine solvas la historia sperto ; la salonaj strategiistoj povas ja proponi bonegajn ideojn kaj diradi "necesas fari nur tion kaj tion", se tiujn strategiajn elektojn ne subtenas konkretaj fortoj kapablaj renversi la nunan sistemon, ili estas sen intereso. Sed ni ne falu en la malan kaptilon de la kontraŭintelektismo oni ne malkovros spontane, en la lukto, kvazaŭ per neerarema instinkto, la plej efikajn strategiojn; neniam la praveco de lukto certigas ĝian sukceson, kaj la "justaj aferoj" ne ĉiam venkas. Necesas do pasi tra laboro samtempe intelekta kaj praktika por informi pri la diversaj formoj de ebla lukto (ka speciale pri tiuj, kiuj estas malplej konataj en nia kultura kaj politika universo), por kritiki la strategiojn historie uzitajn aŭ nuntempe proponatajn, por esplori la efikajn strategiojn, post analizo de la nun ekzistantaj fortorilatoj.

### 1. La necesa rompo

La analizo, kiun ni faris pri la kapitalisma sistemo kaj la senelirejoj, kien ĝi kondukas nian socion, devigas nin aserti, ke ne estas regula kaj grada transiro al la tipo de socio, kiun ni skizis : rompo estas necesa.

Tiu rompo, alia maniero nomi la revolucion, koncernas ĉiu;

aspektojn de la vivo en socio : ekonomion, kulturon kaj ideologion, politikan organizadon, ĉiutagan vivon, ktp..., ĉar ĉio estas ligita. Sed gravas kompreni, ke ĉiuj tiuj rompoj ne disvolviĝas nepre same, nek laŭ sama rapideco. Kalkaj estas necese limigitaj en la tempo, klare difinante "antaŭon" kaj "poston" : tiel la preno de la politika povo, la reala kolektiva alpropigado de la produktrimedoj far la laboristoj. Sed aliaj, same gravaj, etendiĝas en la tempo; jam de nun komencitaj, ili devos daŭradi longtempe post la transiro al la socialismo : esplorado de aliaj formoj de socia organizado (malcentralizado), de aliaj formoj de praktikado de la povo (reala demokratio, memmastrumado), de aliaj modeloj de konsumado, ebleco diskuti kaj ŝanĝi la celojn mem de la ekonomia produktado kaj de la socia organizado, ktp...

Estas do grava eraro levi la problemon de la strategio de transiro al la socialismo nur rilate al la politika-ekomia rompo. Konante multajn historiajn spertojn de neperfortaj luktoj, observante la renovigon de la formoj kaj celoj de la lukto de antaŭ kelkaj jaroj, ni estas kondukataj kritiki radikale ĉian revolucian strategion, por kiu la "malrapidaj" rompoj estus nura konsekvenco de la tuja rompo : "Ni prenu la povon, la cetero sekvos !" Ni opinias, ke la devioj kaj perversioj de la plimultaj "socialismaj" spertoj (kiuj klariĝas ankaŭ per la neceso fronti malamikan internacian ĉirkaŭon) fontas grandparte el tiu mekanista koncepto pri la revolucioj, laŭ kiu la aliigado de la ekonomiaj kaj politikaj strukturoj antaŭas (logike kaj kronologie) la aliajn aliigadojn.

Ni opinias, sekve, ke la konkero de la politika povo ne estas celo per si mem, sed ero el pli vasta strategio. Ĝi ne eblas iam ajn; kaj, ĉefe, ĝi ne pravigas ion ajn.

"La konkero de la kultura hegemonio far la tuta laboristaro, la anstataŭigo per ties propraj valoroj de la valoroj de la burĝa socio konsistigas gravegan momenton, celantan akceptigi al la plimulto de la socio la perspektivon, kaj eĉ la neceson, de funda ŝanĝo. Nur je tiu kondiĉo kaj ne per sukcesinta puĉo la konkero de la politikaj kaj ekonomiaj povoj povas efektivigi veran ŝanĝon de la reganta klaso". Tiel esprimiĝis freŝdate E. MAIRE kaj J. JULLIARD *. Similaj konvinkoj esprimiĝas pli kaj pli larĝe inter la aktivuloj

-------

*) Noto de la trad.: ili estas estraranoj de sindikato CFDT.

korligitaj kun memmastruma esplorado.

Tamen grava danĝero minacas tian sintenon, la danĝero rezignacii, sen konfesi tion, al la "divido de la laboro" : la realismemuloj, la malmolkoruloj, la makiaveluloj de la balotmanovro aŭ la strategiistoj de la popola ribelego prenus sur sin la taskon prepari la tujan rompon, la "Grandan Vesperon" (balotan aŭ sangan, pri tio oni debatados senfine), kaj la revemuloj , la milduloj, la sentemaj ekologianoj kaj aliaj liberecanaj regionistoj prenus sur sin la taskon iniciati (ekde nun kaj poste) la aliajn specojn de rompo...Pli disvastigita ol oni kredas, tiu vidpunkto ne vere malsimilas de la tezo, kiun ni denuncis kiel unu el la kialoj de perversio de diversaj revoluciaj "socialismaj" spertoj : nur la preno de la Povo kaj la senproprietigo de la Kapitalo estus "seriozaj" celoj... Male, ni opinias ke la politika-ekonomia rompo kaj la aliaj rompoj devas esti streĉe ligitaj; tial ni rifuzas tre firme la ideon, ke nia neperforta elekto devus limigi nian "kompetenton" al la organizzado de partaj luktoj aŭ al la rolo (certe necesa, oni koncedos kun ia "simpatio") de "profetoj" de la morgaŭa mondo. Ni opinias, ke ni havas aferojn por diri kaj por fari tiel rilate al la tuja rompo kiel rilate al la aliaj formoj de rompo.

## 2. Nek baloto nek pafilo

Strategio ne estas elektebla abstrakte : ĝi trudiĝas, je preciza momento, laŭ la cirkonstancoj. Sed tio ne signifas, ke ni estas sen povo kaj sen iniciato, ĉar la cirkonstancoj, kiuj determinos la formojn de la luktoj, estos, grandparte, la frukto de la strategiaj elektoj hodiaŭ farataj. Tiel, estas neniel absurde nek idealisme aserti, ke oni elektas (kaj do preparas) cele al fortelprovado, tipon de strategio prefere ol alian.

Absurda estus male elekto trudita de teoriaj principoj, aŭ de penskutimoj, kaj ne de la konsiderado pri la eblo kaj efiko Necesas fakte, ke strategio povu esti reale preparata en la konkreta situacio de lando kiel nia (*); necesas aliflanke, ke ĝi kapablu konduki ne tro malproksimen de la celo, kiun oni fiksas al si. Nu, tiu celo (ĉu necesas rememorigi tion ?) ne estas nur la renverso de la kapitalisma sistemo, sed ankaŭ ĝia anstataŭado per demokrata memmastruma socialismo. La efiko de strategio mezuriĝas do laŭ ĝia kapablo atingi tiun duoblan celon, ne nur ĝian unuan duonon.

---

*)NdT : la verkintoj situas en la kunteksto de Francio, atendante la venkon de la maldekstro ĉe la elektoj de marto 1978.

Pri ambaŭ punktoj (eblo kaj efiko) ni estas kondukataj fari radikalan kritikon de la du tipoj de strategio kutime proponataj (kaj kontraŭmetataj) : la balotismo kaj la perforta ribelo.

La balotismo

La regulon de la parlamenta ludo uzis la burĝaro por konservi sian superregadon. Certe, la popolaj fortoj scipovis, iom post iom, profiti de tiu ludo por trovi en ĝi politikan esprimilon, sed ili ne povos iri pli antaŭen sen ŝanĝi la regulon mem. Eblas venigi finon de la kapitalisma reĝimo per helpo de balota venko, sed certe ne, se oni kontentiĝas per tio. Kredi tion estus danĝere trotaksi la rolon de la "elektita" potenco rilate al la aliaj formoj de povo, kiujn praktikas la burĝaro (notinde la ekonomia).

Eĉ se ebla, tiu revolucio per la baloturnoj cetere ne estus efika, se la efiko mezuriĝas rilate al la celo : memmastrumado fakte supozigas, ke la laboristoj prenu la tutan povon, kiun ili kapablas praktiki sianivele; ĝi ne povas esti dekretita, koncedita el la supro.

Tiu kondamno al la balotismo ne kondukas al la revo pri tuta kaj perfekta rekta demokratio : la "delegado de la povoj" restos necesa sub diversaj formoj en memmastruma reĝimo. Aliflanke, ni ne instigas al la bruligado de la balotkartoj ! Strategio de prenado de la povo far la popolo tre bone povas ampleksi balotan venkon. Sed tio ne estas la decidiga provo : nur grava faktoro inter aliaj faktoroj.

La ribela perforto

Neniu plu pensas serioze pri revolucio, kiu estus nur perforta (puĉo far organizita minoritato aŭ sangverŝado far ribelanta popolo). Sed oni iufoje plu prezentas la organizadon de la popola perforto kiel neceson, eble bedaŭrindan, sed nepran. Ĉu tio ne estas intelekta pigreco, rifuzo serioze ekzameni la aliajn eblojn ? Por ni, ĝuste la analizo de la frontantaj fortoj kaj la zorgo pri vera efiko devas konduki al la rifuzo de ĉia strategio ampleksanta (kaj do preparanta) la perforton. Tio postulas kelkajn klarigojn :

## Ne loki sin sur la terenon de la kontraŭanto

Kio donas forton al la popolamasoj, tio estas la eblo blokadi, per sia nombro, kaj sia organizo, la ekonomian mekanismaron. Kaj ne ilia armilaro,: nek tiu, kiun ili havas (tio ja tro okulfrapas), nek tiu, kiun ili povus eventuale ekkontroli ilia armilaro restus nekomparebla kun tiu, pri kiu disponas la burĝaro. Kio donas al ili malforton, tio ne estas do ilia manko de armiloj, sed ilia diseco, la manko de akordo pri la celoj, la strategio, ktp... Prefere ol armadi la popolon (kio preparus konflikton sur la tereno, kie la kontraŭanto estas kaj restos pli forta), ĉu ne pli valoras, ke la popolo mem fariĝu armilo per sia unueco en la amasa malobeado al la burĝa leĝaro ?

Alia elemento ŝajnas al ni egale decidofara : la tenantoj de la povo ekonomia, politika kaj ideologia ne alprenas personajn riskojn por defendi siajn privilegiojn : tion ili faras per intermetitaj personoj, trovante en gravaj tavoloj de la etburĝaro, aŭ eĉ de la proletaro, kunlaboradon ĝenerale rezignacian, iufoje aktivan. En la fortoj komisiitaj pri "kon servado de la ordo" (notinde, la armeo, la polico), tre multa estas tiuj, kies interesoj estas komunaj kun tiuj de la labor ista klaso. Ĉia strategio devas do havi inter siaj ĉefaj celoj faciligi, cele al la fortelprovado, ilian konsciiĝon pri tiu reala solidareco kaj ilian rompadon disde nur trude akceptita kunlaborado : tio ne eblas, se tiuj personoj sentas sin minac ataj je sia korpo kaj sia vivo; sed tio tute eblas, se la uzata strategio estas eksplicite neperforta. Pli ĝenerale, necesas priinsisti, ke tiuj, kiuj havas interesojn ĉe la revolucio, kaj sincere deziras ĝin, estas des pli forsilentemaj pri ĝi, ke ĝi aperas necese perforta : la timo endanĝerigi sian vivon kaj tiujn de la geamatoj kondukas al multaj rezignoj... Liberigante el tiu timo, la propono pri strategio rifuzanta la perforton povus fari revoluciemaj multajn el tiuj, kiuj hodiaŭ rezignacias al reformismo.

Eble ĉio ĉi aspektas evidenta : tiam oni obĵetas, ke la perforto estas trudata al ni far la kontraŭanto mem, do, ke ne vere estas elekteblo. Diri tion estas forgesi, ke gravega principo de ĉia strategio estas ĝuste, ke oni mem iniciatu pr luktadi sur tereno alia ol tiu elektita de la kontraŭanto. Malakceptante la sinturnon al la perforto, ni proponas strat gion, kiu kontraŭas la tutan preparan klopodon de la burĝaro por malhelpi, kaj, se necese, gajni la fortelprovadon. La

lukto estas fakte translokita al la tereno, kie la laboristoj havas avantaĝon per sia nombro, kaj, se ili donas al si la rimedojn por tio, per sia organizo kaj sia solidareco. "Popolo unuiĝinta neniam estos venkita" tekstas fama slogano ofte uzata en perforta kunteksto; ni vidas en ĝi la ĉefprincipon de ĉia neperforta strategio, se oni aldonas necesan precizigon : "unuiĝinta popolo neniam estos venkita, kondiĉe, ke ĝi ne batalu per la samaj rimedoj kiel ĝiaj premantoj".

Eble ne ĉie kaj ĉiam povas unuiĝinta kaj rezoluta popolo trovi en teknikoj de neperforta agado forton superan (ĉar malsaman) al la perforto de siaj premantoj. Povante paroli nur pri ni kaj pri nia situacio, ni ne povas ekskluzivi sume la eventualecon, en aliaj tempoj kaj lokoj, notinde kiam ne estis kultura kaj teknika preparado al la neperforto, de sinturno al la perforto por eviti malkuraĝan rezignon ĉe premado. Sed en la nuna franca situacio, revolucia strategio nelaŭleĝa kaj neperforta eblas kaj estas eĉ la nura strategio, kiu povas efike atingi la celon.

La vera efikeco : kohereco de la strategio kaj de la projekto

Nenian strategion oni povas elekti pro la nura konsidero al fruaj celoj : kio povas aspekti efika por hodiaŭ gajni forelprovadon, tio povas montriĝi katastrofa rilate al la pli fora celo. Gravas do, ke la maniero, laŭ kiu realiĝas la rompo el la kapitalismo, ne kreu netransireblajn obstaklojn ĉe la realigado de la socialisma projekto. Tial la problemo de la rimedoj estas nek faka problemo, nek demando forlasenda al filozofoj kaj moralistoj : ĝi estas tre precize problemo pri efiko post longa daŭro. Ni pensas notinde, ke la sinturno al perforto volita, programita, organizita kaj preparita (ni do ne parolas ĉi tie pri la preskaŭ neeviteblaj "akcidentoj", kiujn sekvigas ĉia periodo de politikaj ribeloj, kaj kiuj, per sia difino, ne estas kontroleblaj, kiam ili eĉ ne estas provokitaj far la kontraŭanto mem) estas rimedo tute maladapta al la memmastruma socialismo.

Efektive, efika uzado de la perforto postulas armeecan organizon : eĉ se oni zorgas pri garantioj, por ke ĝi servu la popolon kaj estu kontrolata de ĝi, restas la neceso de hierarkia strukturo forte centralizita, en kiu la ordo-

noj iras de supre kaj malfacile povas esti pridiskutataj ĉe la bazo : oni ne povas "memmastrumi" armeon...Oni notu ankaŭ, ke perforta revolucio necese naskas sumon da malamoj, rankoroj, revenĝemoj tre viglegaj. Certe, en neperforta revolucio, la privilegiuloj ne perdas siajn privilegiojn sen kolero kaj sen la volo rehavi ilin per ĉiaj rimedoj, sed tio estas nekomparebla kun tio, kion naskas perforta revolucio, ĝuste ĉar multe pli da homoj estas trafitaj (ne nur privilegiuloj suferas kaj mortas), kaj trafitaj pli profunde (ne plu temas nur pri perditaj privilegioj kaj riĉaĵoj, sed ja pri vivoj). La socialismo, kiu tiam anstataŭas la kapitalismon, malfacile povas esti memmastruma, pro tio ke, por ĝin protekti, oni devas konservi ian polican ŝtaton. Sen revi pri senkonflikta socio, oni devas diri, ke memmastrumado postulas minimumon da socia interkonsento, kaj ke ĉia senbridiĝo de perforto daŭre malebligas ĝin.

Tial konsekvencaj revoluciuloj ne povas neglekti eĉ nur kiel strategian principon, la atentigon, kiun esprimis GANDHI, kaj kiun ilustras la tuta historio de lia lukto : "la celo estas en la rimedoj, kiel la arbo estas en la semo."

## 3. La kultura revolucio

Oni tuj suspektu la misuzon de tiu dirmaniero : tro ofte ĝi estas uzata por maski la neceson de la ekonomia kaj politika revolucio. Por ni, ĝi signifas la tuton de la rompoj, kiuj nepre antaŭu, akompanu kaj daŭrigu la videblan punktan rompon. Tio estas ekzemple la rompo el la ideologio, kiu pravigas la nunajn sociajn rilatojn, prezentante ilin kiel "naturajn", kvankam fakte ili estas historiaj; tio estas la rompo el la koncepto de la leĝeco trudata de la burĝaro, rompo, kiu efektiviĝas konkrete, kiel ĉe LIP aŭ sur Larzako, per la praktikado de la kolektiva malobeado al la kontraŭpopolaj leĝoj. Tio estas la rompo el la vivmaniero, konformismaj kondutoj prezentataj kiel memkompreneblaj, kvankam fakte ili estas "necesaj" nur laŭ la logiko de la nuna sistemo : senkondiĉa respekto al la "aŭtoritatoj", serĉado de la socia prestiĝo, kurado al la "kariero", malestimo al manlaboro, senlima konsumemo. Tio estas ankaŭ la rompo el ia pasiva uzo de la grandaj sociaj instituciaj, kie oni devas submeti sin al la "kompetentecoj" kaj forlasi ĉian responson al la "fakuloj", posedantoj de la Scio : Sano, Edukado, Libertempo... Sed la rompo, kiu iel kondiĉas la aliajn, koncernas la ideolo-

gion de la Profito, plej grava motoro de ĉia socia aŭ individua aktivado, volboŝlosilo de la "estra ideologio", ĝi igas la homon rimedo por la profito (unue kiel laboristo, poste kiel konsumanto) kaj kontribuas igi dezirendaj de ĉiuj la burĝajn valorojn (socian pozicion, komforton, prestiĝon, individuan rangaltiĝon). Ĉar dependa de la profito, la laboro ne povas esti liberigilo; la espero (parte realigita) iom pli bone "profiti" la avantaĝojn de la sistemo instigas la laboristojn kunlabori kun siaj ekspluatantoj, enigante ilin en la ideologion de la "kapitalismo kun homa vizaĝo", de la "partopreno en la profitoj", de la "kunmastrumado", ktp...

Por ke estu kultura revolucio, ne sufiĉas, ke iomaj individuoj efektivigu tiujn rompojn; necesas ankaŭ, ke ili estu kolektivaj, kaj ke ili okazu ne nur ĉe la "marĝenoj" de la socio (tio okazis pli-malpli, en ĉiuj epokoj kaj ĉiuj socioj), sed ĉe la koro mem de la fortoj sociaj, politikaj kaj ekonomiaj. Ĉar oni ne konfuzu la necesan kulturan revolucion kun la manifestiĝoj de marĝeniĝo, kiujn oni pli kaj pli vidas ĉe tiuj (subprematoj aŭ privilegiuloj de la sistemo), kiuj sentas profunde ian malhomecan kaj memmortigan aspekton de tiu sistemo. Ilia ekzistado mem havas politikan signifon, reliefigante iujn mortajn aspektojn de la nuna sistemo, notinde pri la interhomaj rilatoj, la arta kreado, la kvalito de la vivo...Sed tiuj sanaj reagoj, kiuj iufoje kontribuas efike sapei la estran ideologion, fariĝas iluzioj (danĝeraj aŭ ne laŭ la kazoj), kiam ili pretendas montri la vojon por strategio de kompleta ŝanĝo. La ideo, laŭ kiu "sufiĉus", ke ĉiuj iom post iom alprenu similajn kondutojn (komunuman vivon, metion, revenon al la tero, rifuzon al la sociaj trudoj, ktp) por ŝanĝi la socion, estas ideo, kiu miskonas la sociajn pezojn, la ekonomiajn determinfaktorojn, kaj subtaksas ankaŭ la kapablecon de la sistemo toleri sen risko por si tiajn kondutojn. Ni forĵetas do ĉian strategion, kiu identigus la revolucion kun la malrapida kaj grada (per la ekzemplo aŭ la konvinkado) disvastigado de la kondutoj, vivmanieroj kaj valoroj de la morgaŭa kulturo.

La kultura revolucio, kies neceson ni asertas, estas tiu, kiu estas farata kolektive kaj ĉe la luktoj. Ĝi ebligas al la plimultaj laboristoj kompreni, ke la ekspluatado, kies viktimoj ili estas, devenas nek de la fatalo,

nek de individuaj kondutoj, sed de la malbona organizado de la sociaj rilatoj. Ĝi ebligas al ili malkovri, ke ili mem kunlaboras, pli-malpli malkonsçie, al tiu sistemo, kiu eksplu atas ilin, kaj ke tiu truda kunlaborado estas ĝuste la nura reala forto de la sistemo. La konsciiĝo pri ebla revolucia strategio povas tiam realiĝi : la kolektiva, organizata, nekunlaborado, aliranta al kredebla kaj loga politika alternativo.

## 4. Laborista kontrolo kaj popola kontrolo

Estas certe, ke la burĝaro ne lasos sin senposedigi el siaj privilegioj kaj povo sen reagi, se necese perforte. Male al iuj tute falsaj prezentoj de la neperforto (kiuj, cetere, ne povas baziĝi sur ia ajn serioza analizo de la neperfortaj luktoj pasintaj aŭ nuntempaj) ne temas atendi ian "konvertiĝon" de la privilegiuloj. Iel aŭ aliel estos fortelprovo : necesas ĝin prepari.

En tiu prepara periodo, la celo de la luktoj ne estas rekte la prenado de la povo(j), sed la plejeble strikta kontrolo super ĉiuj sektoroj, kie ludiĝos la decidofara elprovo.

### La laborista kontrolo

Sen fali en la iluziojn de la kunmastrumado, nek ĉefe en tiujn de la memmastrumado (malebla en kapitalisma sistemo), la laboristoj klopodas kontroli, en konstanta konflikto kontraŭ la posedantoj de la povo, la laborkondiĉojn, la kadencojn, la daŭran formadon, la kondiĉojn de dungado kaj maldungado, ktp... Tiu kontrolo, se ĝi ne estas rezervita al iuj specialistoj kaj kelkaj delegitoj, rekte preparas la laboristan klason praktiki, tuj kiam estos plenumitaj la politikaj kondiĉoj de la socialismo, la memmastrumadon de la sektoroj de la produktado.

En tiu lukto, la striko restas la ĉefa armilo de la laborista klaso. Sed laŭmezure, kiel plioftiĝas inter la laboristoj la rompo el la leĝisma ideologio, aperas aliaj armiloj por plifortigi kaj iufoje anstataŭi la strikon. La ekzemplo de LIP, en 1973, manifestis certan novecon en la maniero konduki la lukton. Tiu ekzemplo estis imitata, kaj, de tiam, la laboristoj ĉiam pli malofte hezitas antaŭ la atenco kontraŭ la leĝo per la kolektiva praktikado de malleĝaj agadoj : konfiskado de la stokoj, refunkciigado de la produktado, malleĝaj vendadoj, ktp... Ne temas arbitre glui sur tiujn labor-

istojn la neperfortan "etiketon", kiun ili rifuzas; sed oni rajtas konstati, ke fakte tiuj agadmanieroj pliriĉigas la aron de la armiloj, kiujn ni nomas neperfortaj. Laboristoj praktikas kolektive diversajn formojn de civila malobeado, kaj la Povo devas cedi antaŭ la forto, kiun ili tiel mobilizas : jen grava elemento por la agnosko de la ebleco kaj efikeco de neperforta strategio por kontraŭkapitalisma lukto.

La efikeco de la bojkoto estas ankoraŭ malmulte konata en Francio. Sed la laborista movado multon gajnus per la kono kaj apliko de la ekzemplodona lukto, kiun gvidis ekde 1965 la Sindikato de la Agrokulturaj Laboristoj de Kalifornio, sub la impulso de Cezaro CHAVEZ : la kuniĝo de la striko kaj de la bojkoto ebligis venki la grandajn agrokulturajn trustojn, kiuj produktas traŭbon kaj salaton.

La popola kontrolo

La teknokratio ne estas monopolo de la kapitalismo : gravegas do, por la popolo, preni ekde nun plejeble larĝan kontrolon super la sektoroj rilatantaj kun ĝia ĉiutaga vivo kaj ĝia libereco. Tio estas samtempe postulo por la tuja defendo kontraŭ la kapitalisma teknokratio kaj garantio kontraŭ la tre reala danĝero de estonteca socialisma teknokratio. Tiu starigado de la popola kontrolo efektiviĝas en pli punktaj, malpli kunordigataj luktoj, kiujn iuj opinias ideologie malpli "puraj" ol la grandaj laboristaj luktoj. Sed probablas, ke la sukceso de memmastruma modelo de socialismo estas ĝuste ligita kun la ebleco efike organizi tiujn luktojn, kaj trovi por ili plenan politikan esprimeblon.

Tiuj luktoj celas malebligi la kreskadon de la subprema povo de la Sistemo (luktoj kontraŭ la armeizado, kontraŭ la polica kontrolo), bremsi la malfacile ripareblan malbonigon de la vivmedio (ekologiaj luktoj), de nun certigi memdefendon (luktoj kontraŭ la superrajtaj malproprietigadoj, kontraŭ la misuzoj de la polico aŭ de la justico, kontraŭ la rasismo kaj la ekspluatado de la migrantaj laboristoj). Ili esprimas ankaŭ la postulojn, kies tuja ligo kun la klasbatalo ne okulfrapas, sed kiuj ne povas atendi por sin esprimi, ke la socialisma socio estu realigita : luktoj de la hominoj, de la naciaj kaj kulturaj minoritatoj, ktp... Ĉiuj tiuj luktoj povas esti gvidataj per ne-

perfortaj rimedoj, kondiĉe ke la elekto de tiuj rimedoj estu farata post serioza analizo : amasa civila malobeado, rifuzo al la impostoj, simbolaj aŭ humuraj manifestacioj, okupadoj de lokaloj, blokadoj de cirkulado, malsatstriko, bojkotoj, ktp... ne estas interŝanĝeblaj rimedoj. La skeptikismo pri la ebleco kaj efikeco de la leĝismaj rimedoj kaj de la perfortaj rimedoj ne konduku al la naiva kredo, ke ĉiuj neperfortaj rimedoj estas bonaj kaj efikaj, kiaj ajn ili estas, kia ajn estas la situacio. La decido komenci neperfortan lukton kaj la elekto de la rimedoj uzendaj ne estu forlasataj al la sindonemo de indignantaj konsciencoj, sed al la precizeco de strategiaj analizoj. Ĉiufoje, kiam eblos, gravos preferi la amasajn neperfortajn agadojn al la individuaj : notinde, popolaj bojkotoj (kies efikeco estis pruvita antaŭ nelonge en Nederlando kontraŭ la Angola kafo kaj la "Outspan"-oranĝoj el Sudafriko) aŭ amasa civila malobeado (kiu, en 1974, ebligis al la italaj civitanoj nuligi la troajn prezaltigojn de urbaj transportoj kaj elektro). Tiuj novtempaj kaj proksimaj eksperimentoj esperigas, ke, ankaŭ ĉe ni en Francio, la "popola kontrolo" sciOs doni al si armilojn taŭgajn por siaj celoj.

## 5. De la kontrolo al la povo

La luktoj por la kontrolo gravas ne nur pro siaj propraj celoj, sed pro la <u>sperto</u>, kiun ili ebligas ekhavi kaj la <u>pripensado teoria</u>, kiun ili instigas. Ilia sukceso mem devas kontribui malaperigi la ofte bremsan kredon al la "fataleco" (aŭ "historia neceso") de la perforto; iliaj malsukcesoj kaj nesufiĉoj ebligas kompreni, ke la neperfortaj strategioj <u>ne improviziĝas</u>, sed postulas certan nombron da preparoj (psikologiaj, teknikaj, intelektaj, ktp...). La sindikatoj kaj la diversaj grupoj, kiuj kunordigas tiujn luktojn, devus esti kondukataj iniciati klopodon de <u>informado</u> pri la neperfortaj luktoformoj en la pasinteco kaj en la nuntempo, kaj de <u>formado</u> al la neperforta agado.

El tiu tuto (luktoj, teoria pripensado, preparoj), aperas la konkreta eblo konduki la decidigan elprovon neperforte : ĉar, se neperfortaj strategioj provis sian efikon en partaj luktoj, oni ne vidas nome de kia teoria dogmemo oni povus konsideri ilin neefikaj aŭ nesufiĉaj ĉe la momento de la plena lukto; ĉar ĝuste en lukto, kie la multnombro ludas rolon, neperforta agado havas pli da perspektivoj por sukceso, ĉar ĝia ĉefa forto kuŝas en la nombro kaj la solidareco.

Sed tio levas, vere, la malfacilan kaj neeviteblan problemon de la organizado de tiu "nombro" kaj de la konkreta esprimado de tiu solidareco : la problemon de la partio. Neniu homgrupo, kiaj ajn estas la kompetentoj kaj la persona kuraĝo, povas identigi sian propran projekton (eĉ ege malprofitema, ne tio estas la temo) kun la revolucio. La analizo de la historio kaj de la nuntempo de aliaj revoluciaj movadoj devigas nin elekti alian vojon ol tiun de la leninisma modelo. Kaj tiu elekto ŝajnas al ni streĉe ligita kun vera memmastruma celo.

"Preter la leninismo, kiu rezultigis, ĉu tion oni agnoskas aŭ ne, la konfiskadon de la "rekta proletara movado" profite, unue de partio, baldaŭ poste de burokratio, la memmastruma socialismo atingas la bazan celadon de la socialismo, nome redoni la parolon kaj la iniciativon al la amasoj kaj al la individuoj, kiuj konsistigas ilin - malaperigante la perantojn inter la laboristoj kaj la ekonomia povo, inter la civitanoj kaj la politika povo." (E. MAIRE kaj J.JULLIARD).

Kalkulante samtempe kun la realeco de la nunaj socialistaj politikaj fortoj kaj kun la memmastruma projekto, kiun ni celas kun multaj aliaj homoj, ni opinias, ke estas racie konsideri strategion nedisegeble kunordigantan prenadon de la povo "per la supro" (per la alianco de la maldekstraj partioj) kaj la organizadon de multaj popolaj kaj laboristaj povoj. La kontrolo de la ŝtataparato far la fortoj referencantaj al la memmastruma socialismo devas faciligi la organizadon kaj la kunordigadon de tiuj diversaj popolaj kaj laboristaj povoj, kaj doni al ili la leĝan agnoskon nepre necesan por ilia pludaŭrado. Reciproke, la ekzisto kaj plifortiĝado de diversaj povoj de la laboristoj kaj de la civitanoj devas helpi la centran povon rezisti, unuflanke al siaj propraj tentoj pri teknokratio kaj centralizado, aliflanke al ĉia provo de la kontraŭrevoluciaj fortoj rekonkeri la povon.

Estas vivnecese por la daŭra sukceso de demokratia socialismo, ke tiu duobla prenado de la povoj, kiu komence estos nepre konflikta, tia ne restu : la konstanta frontado inter centraliza socialisma povo kaj nekunordigita memmastruma povo ne povus daŭradi longtempe sen favori la revenon de la reakciaj fortoj al la povo. Tial la tasko, kiu de nun koncernas tiujn, kiuj zorgas pri tiu problemo,

ne estas krei la memmastruman partion, sed prepari per duobla laboro la solvadon de tiuj antaŭvideblaj malfacilaĵoj : laboro meze de la klasikaj maldekstraj fortoj praktikontaj la ŝtatpovon, por ke la pezo de la aprobantoj de demokratia socialismo estu plejeble granda; samtempa laboro en ĉiuj luktoj, kie prepariĝas la laborista povo kaj la popola povo, por eviti, ke disvolviĝu la tento de seninteresiĝo, aŭ eĉ malamikemo, nur negativa, rilate al ĉia ajn centra povo. La nura pripensado pri la nunaj luktoj bone montras, cetere, ke nek pri la atomcentraloj, nek pri la armeaj terenoj, nek pri la postuloj de regiona aŭtonomio, io decidofara estas vere gajnita tiel longe, dum decido ne estas farita (aŭ ratifita) far la centra povo. Eĉ se la fina celo restas ja la detruiĝo de la ŝtato, certas, ke memmastruma socialismo ne povos ignori, aŭ eĉ konsideri flanka zorgo, la strategian neceson kontroli la ŝtataparaton.

6. La rezistado al la subpremoj

Preninte la povon kaj la povojn, la popolo zorgu, por ne lasi la forton (armitan aŭ ekonomian) de ĝiaj ekssubpremantoj kaj de ties internaciaj kunekspluatantoj repreni ilin. Jen grava problemo, kiun oni ne povas forlasi al la malprecizeco de ia optimista "ni ja vidos". La aktualo ekzistas kaj memorigas nin: Ĉeĥoslovakio en 1968, Ĉilio en 1973.

Fakte, verŝajnas, ke, ekde la komenco de la socialisma eksperimento, oni devos fronti provojn de premagadoj samtempe enlandaj kaj eksteraj : same kiel en Ĉeĥoslovakio kaj Ĉilio, la grandaj imperiismaj potencoj havus profiton sufoki en la ovo eksperimenton, kies kontaĝa sukceso endanĝerigus ilian propran regadon. Kaj ili trovus en la lando mem, en momento kiam la nova organizo de la socio ne estus havinta la tempon solvi siajn unuajn internajn konfliktojn kaj senteble plibonigi la sorton de la plimulto, multajn kaj organizitajn helpojn, notinde en larĝaj sektoroj de la armeo kaj de la polico.

Tamen, unue sur la tereno de la ekonomio decidiĝos la sorto de la socialisma eksperimento : efektive, la armeo kaj la polico povas interveni nur se sapeado povis antaŭe okazi. Nur kiam la alfrontado ne plu povas esti limigata al la ekonomia tereno, tiam ĝi disvolviĝas sur la armea tereno.

La mastrado de la ekonomio estu do unu el la unuaj celoj. Nu, egaj estas la riskoj de flankenglito : strikoj de la privata investado, elfuĝo de la kapitaloj al la eksterlando tra

la iom maldensa reto de la kontrolo de la monŝanĝoj... La riĉaĵoj de la financaj kaj multnaciaj entreprenoj, la eksterlandaj varomakleradoj en Francio reprezentas fakte sumon tre superan al la nuna devizaro de Francio. La elfuĝo de la kapitaloj povas do tute sekigi la deviz-rezervojn de la Banko de Francio eĉ antaŭ la alveno de la Maldekstro al la povo. La punhaltigaj decidoj, kiujn antaŭanoncas nun la Komuna Programo ne ŝajnas sufiĉaj : naciigadoj, punoj kontraŭ la spekulantoj. Por bremsi la procezon, necesas ankaŭ antaŭvidi kompletan strategion de rezistado de la laboristoj mem : la banklaboristoj, ekzemple, devos bloki iujn transĝirojn, publikigi iujn operaciojn, ktp...

Pli ĝenerale, per la aktiva partopreno de la tuta laboristaro, povos realiĝi la mastrado de la ekonomio. Necesos eviti, kompreneble, ke la ekkontroladoj de la laboristoj super siaj entreprenoj manifestiĝu per malorganizado de la produktado. Tial gravas popularigi la temon de memmastrumado kaj ekde hodiaŭ lukti, por ke la laboristoj mastru la informadon kaj ekhavu la necesan formadon por funkciigi la uzinojn.

La multnaciaj firmaoj, kiuj havas interesojn en nia lando, nepre ĉion faros por saboti provon de socialismo. La laboristoj devas do doni al si ekde hodiaŭ la celon de la internacia kontrolo super tiuj firmaoj. Necesas obteni la kreadon de entreprenaj komitatoj meze de tiuj trustoj mem, kiuj estas la loko de la reala decidpovo; necesas sukcesi krei la unuecon de la agado inter laboristoj de la sama internacia firmao, super la ŝtatlimoj : tiu komuna lukto devas faciligi la internacian subtenon de ĉiu lando, kiu komencus socialisman eksperimenton.

Fakte, nepre necesas, ke, kontraŭ la internaciiĝo de la Kapitalo kaj de la Imperiismo (kiu alprenas nun la maskon de la "paca kunekzistado") estu fine reaktivigata la malnova projekto de la internaciismo de la laboristoj. Oni vidis, ekzemple, kiom la efektiva solidareco de la Londonaj dokistoj kun la lukto de la Kaliforniaj Farmlaboristoj estis decidofara por la sukceso de la bojkoto de la traŭbo en 1970. Necesas, ke demokratia socialisma eksperimento povu trovi eksterlande sufiĉe da aktivaj simpatioj por frakasi ĉian provon de ekonomia sufokado.

La sperto montris, ke post la ekonomia sabotado, la burĝaro ofte havas nur unu lastan solvon : intervenigi la

armeon, helpatan de ekstera imperiismo. Necesas do disvolvi la kontrolon kaj neùtraligadon de la subpremaj aparatoj de la ŝtato.

La armeanoj kaj policanoj entute ne fontas el la reganta klaso : kvankam ili estas rezolutaj defendi la nunan socian ordon per ĉiuj rimedoj, tion ili faros ne pro persona intereso, sed ĉar ili estas kaptitaj en strukturo kaj ideologio, kiuj donas al ili konduton de korpuso tre malsaman de tio, kio ili estus per si mem. Se oni volas neùtraligi la subpreman potencon de la armeo kaj de la polico, oni ataku do ne la armeanojn kaj la policanojn mem, sed la armean kaj polican institaciojn kaj la ideologiojn, kiuj kuntenigas ilin : senkondiĉa obeo, religio de la Leĝo kaj de la ordo, ktp... Tial la lukto kontraù la armeizado kaj la disvastigado de la kolektiva malobeado kiel luktometodo preparas ekde nun, rekte, tiun neùtraligadon de la subpremaj korpusoj. Sed necesas pli rekte klopodi por plivastigi la popolan kontrolon per la sindikatoj de soldatoj en la armeo, kaj per la disvolvado de demokratiaj organizoj ĉe la polico. Kompreneble, la rolo de tiuj diversaj komitatoj, sindikatoj, organizoj estu nur antaùgarda : malebligi al la armeo kaj al la polico saboti la revolucion antaù ol turni sin korpuse kontraù ĝin. Ne temas pri gvidanta rolo : la portugala modelo de revolucio iniciatita kaj estrata de progresemaj aù revoluciaj militistoj ne ŝajnas tre akordigebla kun la tipo de strategio, kiun ni proponas, nek kun memmastruma projekto...

Samtempe kun la kontrolo de la armeo, oni devos celi ĝian progresivan detruiĝon kaj ĝian anstataùadon, por ĝia funkcio de ekstera defendo, per memdefendo de la popolo (vidu ĉap. 4). Demagogia zorgo favorigi al si parton de la armeanoj ne kondu-ku al la sufokado de tiu projekto, kies ekfunkciigado estas esenca por la postvivo de demokratia socialisma reĝimo. Tial, la komencoj de organizado, kiujn donos al si la popolo por sin defendi per la neperfortaj teknikoj, povos de tiam utili por rezisti al la puĉaj provoj de la armeo kaj al la provokadoj de dekstraj ekstremistgrupoj. La plej bona maniero de nun prepari la rezistadon al la probablaj agresoj estas do la uzado de la neperfortaj teknikoj en la popolaj luktoj : endus, ke la laboristaj, sindikataj, popolaj organizoj interesiĝu al tiuj metodoj kaj klopodu uzi ilin en siaj nunaj luktoj, preparante ilian sisteman kaj ĝeneralan uzadon por la decidofara krizperiodo. Ĉar tio, kio karakterizas fine la memdefendon, kiun ni rekomendas, estas, ke ĝi povas esti uzata, sen

grandaj ŝanĝoj en sia principo nek en siaj teknikoj, tiel por la interna kiel por la ekstera defendoj.

7. Ĝis tiam...

Proponante tion, ni memorigas, ke iuj kondiĉoj estas necesaj por atingi nian celon. Sed ni rifuzis priskribi ian detalan scenaron : se ni asertas, ke fortelprovo estas neevitebla, kaj ke necesas ĉion prepari, por ke ĝi povu esti gajnata per neperforta lukto, ni ne povas antaŭvidi, kiam kaj kiel ĝi okazos. Tial ŝajnas al ni grave rompi kun koncepto de la "revolucio" tiel punkta, ke ĝi fariĝas bremsa : antaŭ ĝi, nenio eblas; post ĝi, oni povos zorgi pri la homaj rilatoj, pri la kvalito de la vivo, serĉi la feliĉon, havigi al si la lukson esti neperfortaj... Antaŭ ĝi, ĉiuj luktoj, kiuj ne celas rekte la morton de la kapitalismo estas senutilaj, aŭ eĉ danĝeraj (ili estas "misuzataj"...); poste, oni povos lukti por la ekologio, la rajtoj de la hominoj, la agnosko de la naciaj minoritatoj... Tia koncepto estas danĝere falsa : ĉu ne estas prave serĉi vivi feliĉe eĉ sub la kapitalismo ? Ĉu tiuj luktoj ne pludaŭros, kiam la memmastruma socialismo estos starigita ?

Ĝi estas falsa ankaŭ en perspektivo de neperforta strategio, ĉar ĝi ignoras la neceson akordigi streĉe, ekde nun, laŭeble, niajn luktometodojn kaj nian vivstilon kun nia projekto : neperforto, solidareco, lukto kontraŭ la ekonomiaj kaj ideologiaj fremdiĝoj estas ankaŭ kondutoj por hodiaŭ. Limigi ilin al la nuraj malproksimaj celoj aŭ al strategiaj metodoj, estas fari sin nekredeblaj. Plej malfacile estas aserti kaj vivi tion sen fali en la idealistan iluzion de la "strategio de la neĝbulo", laŭ kiu sufiĉus multaj individuaj ŝanĝoj multiĝante per la kontaĝo de la ekzemplo, por ŝanĝi la tuton de la sociaj kaj politikaj strukturoj. Se oni gardas sin de tiu iluzio, se oni vidas klare, ke la politikaj kaj sociaj strukturoj ne estas aro da individuaj kondutoj, se oni reasertas, ke la socialisma memmastruma revolucio ne estas afero de "belaj sentimentoj" kaj noblaj intencoj, tiam (sed nur tiam) oni povas permesi al si memorigi pri kelkaj evidentaĵoj : la politika lukto ne limiĝas al aro da teknikoj kaj celoj; la transformado de la socio ne estas celo por si mem, sed rimedo, por ke la nunaj viktimoj de la sistemo trovu la eblon krei libere la formojn de sia feliĉo, estas do nenia efika politika lukto, se ĝi

evitas vivi hodiaù tion, kion oni volas proponi al la tuta socio por morgaù.

***

# ĈAPITRO 4

*********

## AL NEPERFORTA POPOLA DEFENDO

### 1. Defendo en akordo kun niaj politikaj celoj

Ju pli ni progresos en la realigado de tia projekto, des pli oftaj estos la riskoj de alfrontado. Antaŭeniri al la memmastrumado estas koncepti samtempe la defendon de la memmastrumado.

Fronte al la konstantaj kondiĉoj de subpremado (ekonomiaj, politikaj, ideologiaj), la memmastruma strategio aspektas kiel ofensiva respondo de la popolamasoj. Sed la disvolviĝo de tiu strategio trudas al la konservemaj fortoj organizi la subpremadon kontraŭ la laboristoj kaj la tuta popolo. Necesas do antaŭvidi tiajn agresojn kaj prepari sin por respondi al ili plej efike.

Kiam popolo ekkonsciis, ke ĝi estas viktimo de maljustaĵo, ĝi sentas sin en stato de "prava defendo" kaj povas tiam inventi siajn proprajn rezistmetodojn. Sed se tiu popola lukto venkas, necesas ankaŭ protekti la "obtenitaĵojn" kontraŭ ĉia malantaŭenreveno : estas tie konstanta dialektiko inter memmastrumado kaj memdefendo, kies terminojn oni devas precizigi konkrete.

Streĉe ligita kun la ofensiva strategio, kiun reprezentas la memmastruma dinamismo, necesas koncepti strategion de memdefendo. Ambaŭ strategioj devas esti en konstanta akordo : tio necesas por la efiko kaj kohero. Ni do ne kritikas la principon de defendo, sed ni relokas ĝin en la kuntekston de la antaŭeniroj al la memmastruma socialismo. Tiel metante la problemon de la defendo per politikaj konceptoj (por konceptoj de ŝanĝo de socio), ni povas pli bone difini la celojn kaj rimedojn de tiu defendo : necesas fakte respondi la demandojn : "kial sin defendi?" kaj "kiu sin defendas ?" antaŭ ol povi proponi respondon al la demando "kiel sin defendi ?".

#### Kial sin defendi ?

En nia perspektivo (konstruado de la memmastruma socialismo) necesas distingi plurajn formojn de interdependaj agresoj. Fakte, se la socia situacio fariĝas tia, ke la

reganta politika povo sentas sin minacata, ĝi disvolvas, por konservi sian aŭtoritaton kaj sian ekzistadon mem, ne unu specialan tipon de agreso, sed serion da agresoj, pli-malpli ligitaj unu kun la aliaj. Tiuj mekanismoj de konservado de la povo aperas speciale en la politikaj situacioj, kie maldekstra politikaj partioj kontrolas parte la ŝtaton (kiel en Ĉilio), a kiam la plioftiĝo de la sociaj kaj popolaj luktoj grave endanĝerigas la regantan politikan povon (kiel en majo 1968 en Francio). En tiuj diversaj situacioj, la konservemaj fortoj organizas unue ideologian agreson multe pli intensan ol kutime, des pli facile, ke la ĉefaj informiloj (televido, radio) restas sub ilia kontrolo. Oni emas malestimigi la provon de politika ŝanĝo, similigante ĝin al la minaco de "anarkio" aŭ "diktaturo". Oni disvolvas la tezon de "internacia komploto" : profesiaj agitistoj kaj provokistoj venis el la eksterlando por organizi la malordon aŭ submeti la landon al la povo de eksterlandaj potencoj... Fine, la propagando de la povo emas veki la refleksojn de timo kaj individuismo, por tiel dividi la popolon kaj bremsi la impeton de la luktoj.

Tiu ideologia agreaado estas ligita kun agresado ekonomia. Ĝi fakte des pli efikos al la popolo, ke la ekonomiaj perspektivoj iĝos fakta situacio : estas do tute interese por la burĝaro (nacia aŭ internacia) paralizi la landon, organizante ĝian blokadon. La koncentrado de la kapitalo ebligis al ĝi teksi tutan reton el supernaciaj, superŝtataj rilatoj, kiuj facil-igas kaj multe efikigas la ekonomiajn kaj financajn premojn al iu aŭ alia el la landoj, kiuj volus ekiri sur la vojo al socialismo : la elfuĝo de la kapitaloj, la disvolviĝo de la inflacio, la blokado de krudmaterialoj aŭ de iuj vivnecesaj produktoj, la koruptado de la responsuloj, la instigo al la fuĝo de la kadroj, la turisma bojkotado, ktp... iĝas oftaj praktikadoj kiujn oni vidis funkcii ankoraŭ antaŭ nelonge en Ĉilio kaj Portugalio.

En tiu klopodo malstarigi la ekonomion, la dekstraj kaj ekstremdekstraj movadoj povas, per la agadoj de siaj taĉmentoj, ludi kroman rolon. En politika situacio devige malstabila, ili povas krei etoson de timo kaj malsekureco per atencoj kaj provokadoj kontraŭ la vivnecesaj centroj de la ekonomio aŭ kontraŭ politikaj personoj. Ili tiel sukcesas pligrandigi la popolan emocion, aperigi la koleron kaj la timon : la faŝismemaj movadoj kaj la tuta dekstrularo povas tiam postuli revenon al la "normalo" per energia kaj ordonema manprenado.

Kiam tiu sapea laboro, ideologia kaj ekonomia, ŝajnas sufiĉa, la ĝenerala situacio eblligas "pravigi" la intervenon de la subpremaj fortoj, notinde la armeo. Ĝi povas tiam sin prezenti kiel la institucio, kiu restarigas la respublikan rajton, restarigas la ordon en la civitoj kaj la pacon en la lando. Tiuj oficialaj formuloj signifas tre precize, ke procezo de brutala kaj sistemeca premado estas rekte ekfunkciigita. Laŭ la cirkonstancoj, ĝi iras de nuraj alparoladoj al la senjuĝaj ekzekutoj. Nova ordo stariĝas, kiu estas nenio alia ol la restariĝo de la malnova ordo...

Sed se, pro diversaj kialoj, la militista puĉo ne povas esti ekpensata, aŭ fiaskas, ekzistas ankoraŭ lasta helpaĵo : per la ludo de la internaciaj aliancoj, la konservemaj fortoj povas peti la intervenon de imperiisma potenco por reguligi situacion, kiun ĝi ne plu mastras. Ekzemple, pretekstante la savon de siaj ŝtatanoj aŭ siaj ŝtatlimoj, aŭ ankaŭ de siaj "interesoj", tiu alilanda potenco intervenas milite kaj komencas procezon de "normaligado", instalante novan estraron tute submetitan.

Fronte al tiu malsimpla aro da agresadoj, necesas difini, por ĉiu el ili, specifajn respondojn kaj taktikojn. Tiu sinsekvo de eblaj agresadoj difinas fakte "hierarkion de minacoj" por la socialisma movado. Tio ne signifas, ke oni povas determini kronologion de la minacoj : ĝi varias, fakte, laŭ la stato de la internaciaj fortoj kaj laŭ la politika kaj geografia situacio de la koncernata lando. Tiel, por lando de la kapitalisma bloko, la Historio ŝajne montras, ke ĝi devas atendi unue ekonomian blokadon, nur poste militistan intervenon, kiu ĉiam restas ebla (Ĉilio). Male, lando de la soveta bloko povas atendi tuj militistan intervenon (Ĉehoslovakio). Fine, la enlanda situacio faros pli-malpli intensa iun aŭ alian el tiuj agresformoj.

Antaŭvidante tiun aron de eblaj agresadoj, la strategio de memmastrumado kaj memdefendado konsideru kiel unuan zorgon la problemon de la rezistado al la ideologiaj kaj ekonomiaj agresadoj : tio estas fakte problemo de strategio frue uzota. Sed, ĉar ĝin ni aludis (tro skize, vere) en la antaŭa ĉapitro, ĉar ĝi estas streĉe ligita kun la strategio de transiro al socialismo, la proponoj, kiujn ni tuj faros ĉi tie, situas prefere en la hipotezo de <u>perarmila agresado</u>, kia ajn estas ĝia formo : enlanda armea

puĉo aŭ eksterlanda imperiisma agresado.

Ĉu necesas pro tio preterlasi alian hipotezon, nome eksterlandan agresadon kontraŭ lando ankoraŭ kapitalisma, kies celoj estus tre malsamaj de tiuj, kiujn ni ĵus menciis ? Iuj gravaj faktoj de tiuj lastaj tridek jaroj (kreskanta armeizado de la orientaj kaj okcidentaj socioj, enkonduko de la atoma komponanto en pluraj defendsistemoj, malsimpligo de eĉ la nenukleaj armiloj, ktp) radikale ŝanĝas la bazojn de eventuala konflikto kiu hodiaŭ malmulte povus simili tiun de 1940. Tiuj faktoj estas elementoj, kiuj plietigas kaj limigas la eventualecon de "klasika" konflikto, sed kiuj ne ebligas forigi ĝin definitive la moviĝemo de la politikaj situacioj kaj la malstabileco de la internaciaj rilatoj igas probabla por morgaŭ, tion, kio hodiaŭ aspektas malmulte probabla. Krome, la ekzisto de fokusoj de monda streĉiteco kaj la rezoluta ekspansiemo de la imperiismoj (kialoj, kiuj jam estigis la du lastajn mondmilitojn) estas pli aktualaj ol iam ajn. Ni havas do nenian seriozan kaj decidofaran kialon por forigi tian hipotezon, nek pli por antaŭdiri, ke tiu eventuala konflikto okazus pli probable en la Tria Mondo ol en Okcidenta Eŭropo.

En tiu hipotezo, estas io ĉiam rezolute defendenda : la akiraĵoj de la popolaj luktoj, t.e. la projekto de naskota socio. Fakte, iuj rajtoj, kiujn ni hodiaŭ konsideras akiritaj, povus esti minacataj, ĉar juĝataj kiel neakordigeblaj kun la socia ordo, kiun volus starigi la agresanto : sindikataj kaj politikaj rajtoj, individuaj kaj kolektivaj liberoj, notinde.

Tamen, estu klarege, ke, en tia hipotezo, la celoj de la defendo estas malsame vidataj : ĉar tiam temas multe malpli pri defendo de ekonomia sistemo (kies rimedojn kaj celojn ni hodiaŭ kontraŭstaras), ol pri protekto kaj defendo antaŭ ĉio de loko de kolektiva vivo difinita per kulturaj tradicioj. Kun tiu signifo, kaj nur kun tiu signifo, ni povas paroli pri "defendo de la teritorio", dirmaniero uzata de la estra klaso laŭ nur naciista vidpunkto. Tiu nocio de defendo de la teritorio (pli precize memdefendo de la teritorio) fariĝis ŝlosilkoncepto por studi la bestajn kolektivojn kaj la homajn grupojn alfrontantajn eksteran agresadon, kiu minacas ilian propran ekziston kaj la postvivon mem de la specio. Plej gravas, ke tiu nocio enmetiĝu kiel tia en defendprojekton. Tio ne signifas, ke ĝi rompas la ligon inter la defendprojekto kaj la politika projekto, ĉar tiu memdefendo de la teritorio devas transformiĝi al politika lukto por ŝanĝi la socion. Oni tie inspiriĝu per iuj emoj de la franca Rezistado dum la nazia okupacio,kiuj

aktivadis tiom por forpeli la okupanton el la lando, kiom por starigi ĉe la Liberigado socialisman povon.

Kvankam ĝi estas unue kolektiva organizado, defendprojekto ne povas neglekti pro tio la psikologiajn bazojn de la defendbezono. Ĉar ne estas politika problemo, kie la afekcieco intervenas tiel profunde, kiel en tiu defendproblemo : ĝi estas fakte streĉe determinita per la maniero, kiel ĉiu konsideras sian propran individuan defendon. Ĉiu debato pri la defendo entenas kiel malantaŭaĵon paroladon pri la morto. Oni emas tiel raciigi per argumentoj teknikaj, politikaj, ekonomiaj, tion, kio profunde dependas de malraciaj bazoj. Ĉia projekto pri kolektiva defendo tiam fariĝas sistemo de individua protekto kontraŭ la morto. Tial malracia timo pro la minaco restadas en ĉiu homo, eĉ sen ia ajn objektiva bazo. La homa psiko kaj la historia sperto de la homaro kunligiĝas por instigi ĉiun homon serĉi etoson de sekureco, kiu "trankviligas" lin aŭ ŝin. Interne de kolektivo, la homaj rilatoj kaj la komunikoj inter individuoj ne eblas, se ĉiu ne sentas, ke lia aŭ ŝia ekzistado kaj lia aŭ ŝia persona integreco estas sekuraj. Tiu sento iel kondiĉas do la organizadon de la homa laboro, kaj, per tio, la ĉiutagan aktivadon de popolo.

Por resumi, ni diru, ke defendprojekton, en la perspektivo de memmastruma socio, oni devas ellabori el <u>politika analizo de la agresoj</u>, sin apogante sur la nocioj de <u>memdefendo de la teritorio</u> kaj de <u>persona sekureco de la individuoj</u>.

Tiu alproksimiĝo ebligas pli bone vidi la limojn de nia nuna defendsistemo kaj montri ĝiajn kontraŭdirojn. Fakte, se tiu sistemo referencas eksplicite kaj oficiale al la "defendo de la teritorio" kaj al la "sekureco de la francoj", ĝiaj politikaj celoj estas ĉiam prezentataj malklare kaj neniam difinitaj. Redoni al la koncepto "agreso" ĝian tutan politikan signifon, estas aperigi samtempe la malkoherecon de la nocio "minaco", sur kiu baziĝas la tuta strategio de la nacia defendo. Estas tiel, probable ĉar la ideo mem pri "nacio" ne estas pli klara ol tiu pri "minaco"... Kion oni defendu : kulturan heredaĵon ? la ŝtaton ? ekonomian sistemon ?

Endas ja agnoski, ke la ideo pri nacio, eĉ kiam ĝi respondas al kulturaj kaj historiaj realaĵoj, restas ideologia ilo uzata far la estra klaso por kredigi pri komuneco

de interesoj de ĉiuj preter la klasaj limoj : estus do normale, por ĝi, silentigi la enlandajn dividojn, kaj eĉ"sin oferi ktp... En socialisma orientado, por organizi konkrete la defendon, necesos, kompreneble, kalkuli kun la nacia fakto kiel historia kaj kultura heredaĵo; sed endas denunci la uzon faratan de la nocio "nacia defendo", per kiu oni fine pravigas la ideon, ke estas "enlanda malamiko", kaj organizas kontraŭ li la tutan strategion de la "Operacia Defendo de la Teritorio" (franclingve, DOT) : por la - de sinjoro FANTON en 1970 - agnoskita celo "eviti ĉian revenon de la eventoj, kiuj skuis Francion en 1968", DOT praktikas teknikan voktadon kaj ideologian kontrolon de la suspektatoj (serĉado de informoj, centralizado de la informoj per komputoroj) kaj organizas tutan substrukturon por duobligi la civilan reton en la kazo, ke tiu estus paralizita per enlanda renversemo : telekomunikoj, poŝto, transportoj, provizado de energio...

Ĉiuj nunaj klopodoj por renovigi la francan armeon montras la hipokritecon de la oficialaj ideoj pri defendo. Tia, kia ĝi estas prezentata al ni, la "nacia defendo" estas mito : la defendo de la "nacio" restas fakte la defendo de la kapitalisma sistemo. Tiu mito estas ankoraŭ tiel kredebla, ĉar la reganta ideologio ĉiam ligis al la nuna kadro de la "nacio" tiun bezonon de defendo, kiu respondas multe pli profundajn historiajn kaj psikologiajn realaĵojn.

## Kiu sin defendas ?

Atribuante al la minacoj enhavon ideologian kaj ekonomian antaŭ ol agnoski al ili armeecan karakteron, ni estas kondukataj koncepti la defendon kiel multdimensian sistemon, ne kiel protektadon strikte armeecan. Agnoskante, ke la temoj de la eventualaj konfliktoj estas de nun sumaj, kaj ne plu limiĝas al la defendo de la "landlimoj", ni alvenas logike al la konkludo, ke la defendo estas funkcio de la tuta socianaro : anstataŭ armeizi la tutan socion (vidu ĉapitron unuan), necesas civiligi la tutan defendon, t.e. doni al la tuta landanaro la mastradon pri la celoj, la strukturoj kaj la teknikoj de defendo.

Tial ni preferas paroli pri socia defendo ol pri nacia defendo, kaj eĉ pri popola defendo, reference al la memmastruma strategio. Nu, se la popolamasoj estas la nuraj, kiuj povas ekfunkciigi la memmastruman strategion, ili estas ankaŭ la centra elemento de la strategio de memdefendo. La defendo povas do esti konceptata kaj organizata nur kun streĉa ligo kun

la organizado mem de la defendenda socio. La memmastrumaj strukturoj "ĉe la bazo" (vidu ĉapitron 2an) iĝas tie "memdefendaj grupoj". Kaj same kiel la laborista kontrolo kaj la popola kontrolo estas la celoj de la memmastruma strategio, tiel la laborista defendo kaj la popola defendo estas la organizbazoj de la defend-strategio.

Disvolvi tiun konceptadon estas okulfrape kritiki la tutan strukturon de la modernaj armeoj. La delegado al aparato, kies funkcio estas la defendo, disvolvas veran armeecan socion, kun ĝia hierarkio, ĝia disciplino, ĝia arbitreco. Tiu armeeca socio iĝas fremda korpuso en la civila socio, kaj la historia sperto montras, ke la unua ĝene emas kontroli la duan. La pafilo kontrolas tion politikan, ne tio politika mastras la pafilon.

La defend-funkcio iĝis afero de anonimaj teknikistoj, praktikantaj egan povon en ĉiuj sektoroj de la armado, sen kontrolo far la civitanoj. Krome, tiun estran situacion plifortigas la armeeca ideologio disvastigata meze de la publika opinio, kiu prezentas la armeajn strategiistojn kiel "la specialistojn de la defendo", kio kontribuas disvolvi la pasivecon aŭ neinteresiĝon de la popolo pri la problemo de la defendo.

Kiel sin defendi ?

(Noto de la trad. : La neperfortaj teknikoj, kiujn la verkintoj proponas por la popola memdefendo,estas kompareblaj al la teknikoj proponitaj de la verkintoj de la broŝuro "Ĉu armeo aŭ civila, neperforta defendo ?" por la defendo de kolektivo minacata per ekstera agresado. Tial la tradukintino ne tradukis tiun paragrafon, kaj konsilas al la legantoj studi la broŝuron "Ĉu armeo aŭ civila, neperforta defendo ? ", eldonitan de la pacista frakcio de SAT.)

3. Por strategio de "transarmado"

La progresado al popola neperforta defendo aspektas kiel longa kaj malsimpla procezo, pro la trejnado kaj la partoprenado, kiujn ĝi postulas de la popolamasoj. Tial ĉia propono de punkta kaj brutala forlaso de la perarmila sistemo por neperforta sistemo povas esti kredebla, nek teknike nek politike.

Se la deklaroj pri la Unuflanka Malarmado estas respektindaj en siaj intencoj, mankas al ili la realismo, tial ili

ne ..helpas. Cetere, tiuj mem, kiuj posedas la armilojn, argumentas favore al universala malarmado, sen fari ian ajn klopodon tiudirekten : oni ankoraŭ atendas, ke la alia "sin malarmu", kaj, atendante, oni kreskigas senĉese sian propran armilaron. Por povi efike kontraŭstari al la armeizado, politiko de paco devas konsideri la kialojn, kiuj kondukis al la fenomeno, kiun ni konstatas hodiaŭ, kiuj klarigas ĝin kaj utilas por pravigi ĝin. Politiko de paco baziĝu sur la agnosko de la ekzisto de la streĉoj, de la konfliktoj kaj de la krizoj, kiuj utilas por pravigi ĝin. La aprobantoj de senkondiĉa Unuflanka Malarmado situas tro facile "super la batalo" kaj ignoras la fort-rilatojn, kiuj regas la vivon de la homaj kolektivoj. Ili faras tiel gravan politikan eraron.

Tial, ni opinias, ke la nocion "Malarmado" konvenas anstataŭigi per tiu de transarmado. La malarmado, kiu difiniĝas nur negative, lasus post si strategian malplenon, kiu fariĝus politika nesufiĉo. Male, la transarmado plenigas tiun vakuon, ekfunkciante progresive la rimedojn de alia defendo. Nur strategio de transarmado, entenante plurajn etapojn al grada evoluado de la armila sistemo al la plena organizado de popola neperforta defendo, kapablas rompi la nunan logikon de la vetarmado. Tia strategio implicas, unuflanke, la racian malarmeizadon de la socio, kaj, aliflanke, la ekfunkciigon de neperarmilaj rimedoj por solvi la konfliktojn. En la perspektivo de nia politika projekto, ni antaŭvidas samtempe la detruiĝon de la armeo kaj la progresivan organizadon de popola neperforta defendo, samtempe unuiĝante en dialektika movado. Male al strategio de malarmado, kiu lasus la kolektivon sen defendo, strategio de transarmado ebligas certigi, ke la popolo havos la rimedojn por sin defendi dum la tuta procezo de transformado de la socio.

Partoprenante en la strategio de transiro al la memmastruma socialismo, la strategio de transarmado trovas sin plifortigata per la disvolviĝo de la sociaj luktoj. Kiam tiuj estas kondukataj laŭ la principoj kaj la metodoj de la neperforta agado, kiel ĉe Larzako kaj en Marckolsheim, ili donas ideon, je regiona nivelo, pri tio, kio povus esti popola neperforta defendo. Fakte, dum tiaj luktoj, la popolo preparas sin plej efike al la realigado de tia defendo.

Same, konscienc-obĵetantoj realigas nuntempe, spite striktan leĝon, kiu ne ebligas tion al ili, veran servon de defendo dediĉitan al la esplorado, al la trejnado kaj al la agado por ebligi la starigadon de popola neperforta defendo. Tiu "servo"

tamen ne estas rezervita nur al la junuloj, kiuj devas fronti la "devon" de nacia servo. Tia laboro de esplorado kaj preparado koncernas ankaŭ ĉiujn civitanojn, sen distingo pri sekso aŭ aĝo :eĉ tiuj, kiuj plenumis perarmilan servon kaj apartenas al la armea institucio (kiel rezervuloj aŭ pro la leĝo de 1959) devus povi praktiki libere la rajton pri konscienc-obĵetado. Tial la tre multaj resendoj de soldat-legitimaĵoj, aŭ ilia detruo, estas ne nur protest-agadoj; ili signifas por tiuj, kiuj praktikas ilin, veran sindevontiĝon por trovi pozitivajn kaj kolektivajn respondojn al la politika problemo de paco hodiaŭ konservata per la ekvilibro de la teroroj. Tiel la aktiva konscienc-obĵetado estas grava faktoro en la ellaborado de strategio de transarmado.

Tamen, la transiro de la nuna sistemo de perarmila defendo al popola amasa organizado ne efektiviĝos, sen ke la militaparato mem sin transformu. Ege fremda al la popolo, kiun ĝi laŭdire defendas, la armea korpuso devas fariĝi tiel popola, ke ĝi disiĝu en la popolo kaj fine malaperu, tiel ke la popolo mem fariĝu sia propra defendilo. En tiu perspektivo, ni agnoskas, ke unu el la necesaj etapoj al la detruiĝo de la armeo estas ties kontrolo kaj transformado laŭ la principoj kaj la postuloj de la memmastruma demokratio. Kaj la kontrolo super la armeo far la popolo transiras tra la organizado de la sindikatismo en la armeo. Aserti tion ne estas, memkompreneble, pravigi unu aŭ alian el la du karikaturoj, tra kiuj la armea sindikatismo estas prezentata al ni, iufoje kiel etburĝa reformismo, kiu kontentiĝus, petante la plibonigon de la ĉiutaga vivo, iufoje kiel revo pri la mita Granda Vespero, kiam la soldatoj turnos siajn armilojn kontraŭ siajn oficirojn. La utila kaj necesa tasko estas, ke la soldatoj (soldatservuloj aŭ profesiaj soldatoj) donu al si la eblon pripensi kune pri la funkcioj, kiujn la armeo pretendas plenumi en nia socio. Temas ja pri ege politika debato, ekster kiu estas sensence voli gardi la arme-institucion.

Alia tereno, kie devas praktikiĝi ekde nun la laborista kontrolo, estas la armila industrio kun ĝia tuja konsekvenco : la komerco de la armiloj. Fakte, unu el plej gravaj konsekvencoj de la nuna armea politiko de la franca registaro, kiu rekte koncernas la laboristojn, estas la vendo de armiloj al aliaj landoj, kiu nur kreskigas la riskojn de

konflikto en la mondo. Estas tie, tra la armeizado de la ekonomia sektoro, okulfrapa ekzemplo de la mekanismo de la perforto, en kiu la tuta lando estas prenita. Malantaŭ la preteksto, cetere uzata de la diversaj ministroj, certigi oficon al ĉiu, maleblas hodiaŭ ne starigi la demandon pri la celo de la ofico. Certe, necesas kalkuli kun la malfacilaĵoj, kiujn la ĉesado de la armilvendoj levus por multegaj laboristoj de la armiluzinoj; ĝuste por povi fronti tiujn malfacilaĵojn kaj la eventualecon de industria transformado, la sindikatoj devas praktiki realan kontrolon super la fabrikado de armeaj ekipaĵo Akcepti foroferi rezolute la liberecon de la popoloj premataj far la reĝimoj, al kiuj ni vendas armilojn, estus okulfrape kontraŭdira kun strategio de transarmado, kiu pasas, male, tra la vojo de la internacia solidareco, kaj, pli precize, tra la laborista internaciismo.

Estas klare, ke konstruema antaŭeniro en unu aŭ alia el tiuj sektoroj dependas ankaŭ de la politikaj decidoj. Krom ke ĝi povas esti faktoro de plirapidigo en la ellaborado de la transarmado, kiel pri memmastrumado, la politika kontrolo de la Ŝtato estas necesa etapo. Tial ni opinias, ke la maldekstra organizoj, sindikataj kaj politikaj, devas prepari la ekfunkci igon de neperarmila defendo ekde la prenado de la ŝtatpovo.

***

P r i   l a   v e r k i n t o j
**********************************

d e   t i u   ĉ i   b r o ŝ u r o
*********************************

M.A.N. (Movado por Alternativo Neperforta) estas federacio de lokaj neperfortaj grupoj en Francio. Ĝi donis al si kiel celon studi kaj praktiki la neperfortajn luktoteknikojn por meti ilin al la servo de la konstruado de memmastruma socialismo. Tial MAN luktas kontraŭ la armeizado, por ne-perforta popola defendo, faras teorian kaj praktikan esploradon pri la civila malobeado, subtenas la ekologiajn luktojn, kunordigas la lokajn luktojn aŭ ilin iniciatas, informas la popolon pri la neperfortaj agadoj, faras teorian esploradon pri neperforto.
La kamaradoj, kiuj deziras plian informon pri tiu organizo povas skribi (prefere en franca lingvo) al la nacia adreso:
Mouvement pour une Alternative Non-violente
20, rue du Dévidet
F 45200 MONTARGIS, Francio.

***************************************************************
Directeur & imprimeur: Baudé, 47340 Laroque. CPPAP 39.863